


EL POPOLA
CINIO ⁵/₁₉₆₅





La Ŝenjang-a
Transformator-fa-
briko servanta la
kamparon en elek-
trigo.

Foto de Ĝang Gjun

Ĉefa Enhavo

Sur la kovrilo — Sur la Triticodraŝejo

Foto de Ĉen Hivej

Aklamo al la Fondo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono

Nova Tajdo en Produktado kaj Konstruado

Plezura Naĝado de Prezidantoj Maŭ kaj Liu en la Dektrimaŭzolea Akvorezervejo

Konkurso inter Fabrikoj de Pekino kaj Tiangin

Ĉina Aligatoro (*Kuriozaj Bestoj*)

Lupo kaj Pego (*Fablo*)

Aromas Rizo Riverborde

Ĝusta Vojo de Agronomia Eksperimentado

Li Giefu — Revolucia Komponisto

La Nova Fizionomio de la Agrikulturo sur la Monda Tegmento

Nova Tibeto post la Demokratia Reformo (*Bildpaĝoj*)

“Bari Maron kaj Trabori Monton por Riĉa Rikolto” (*Fotokolekto*)

Malsamaj Tagoj ĉe la Klara Lago Flor-gastejo (*Poemo*)

Vera Heroo Min Edukis

La Ridindaj Usonaj “Strategiaj Aeroplanoj”

Batal-tamburado ĉe l’ Ekvatoro

Esperanto, Lingvo de Paco, Ŝlosilo de la Laboranta Ĉinio

Veĵcio

Rekunigo de Mamuta Dinsaŭra Fosilio

Post la Kurso

Sur Nia Librobreto

Esperanto Marŝas

Distra Angulo

Korespondi Deziras

Korajn Dankojn al Niaj Legantoj (*Inter Ni*)

Sur la dorskovrilo — Bejhaj-parko en Festa Kostumo

Foto de Liaŭ Ĝigen



AKLAMO AL LA FONDO DE LA TIBETA AŬTONOMA REGIONO

La fondo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono estos oficiale proklamita, kiam tiu ĉi numero de EPC atingos la manojn de niaj legantoj.

Tio signas la plenan venkon atingitan de la demokratia reformo en Tibeto, la sudokcidenta parto de Ĉinio, la komencon de socialisma transformado de ĝia agrokultura kaj brutopaŝta mastrumado kaj ankaŭ la diskrevon de la iluzio de areto da reakciuloj, kiuj esperis, ke la feŭda servuta sistemo estos konservata por eterne en Tibeto.

En marto, 1959, la tri feŭdaj mastroj — la loka registaro, aristokrataro kaj monaĥejoj, kiuj posedis la tutan agraron kaj brutaron de Tibeto, kaŝe instigate de eksterlanda reakciularo, faris armitan kontraŭrevolucion ribelon por konservi siajn feŭdajn privilegiojn. Sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, la miliono da tibetaj servutuloj firme batalis kontraŭ ili. Tiam la ribelo estis rapide frakasita kaj ĉie sur la vasta tero de Tibeto disvolviĝis la granda movado de demokratia reformo. Kun la disvolviĝo de la movado, la miliono da servutuloj stariĝis. Per la batalado, la servuta sistemo estis abolita, popolaj registaraj organizoj estis starigitaj, la tero, brutaro kaj agrokulturiloj de la ribelintaj servutul-posedantoj kaj iliaj agentoj estis konfiskitaj. Koncerne al la produktaj rimedoj de la servutul-posedantoj, kiuj ne partoprenis la ribelon, la politiko de elacĉetado estis aplikita, kaj sub la lumo de la politiko “Kiu plantas, tiu rikoltas”, disvolviĝis la produktado de agrokulturo kaj brutopaŝtado.

En la mallonga periodo de 1959 ĝis 1965, noviĝis Tibeto. Kvan-kam ĝiaj naturaj geografiaj kondiĉoj restas la samaj kiel antaŭe — la “monda tegmento” restas same alta, ne aliiĝis la tiea malsufiĉeco de oksigeno kaj senŝanĝaj restas ĝiaj montoj kaj riveroj, tamen Tibeto jam alprenis tute novan fizionomion.


Tibeto jam forlasis la ege postigintan feŭdan servutan sistemon, trapasis la demokratian reformon kaj suriris la luman vojon de socialisma transformado.

En sep sinsekvaj jaroj, Tibeto akiris abundegajn rikoltojn de agrikultura produkto kaj ankaŭ ĝia produkto de brutopaŝtado kreskadis firmpaŝe. Sub la helpo de la ŝtato, Tibeto konstruis nombron da modernaj fabrikoj de agrokulturaj instrumentoj, aŭtoriparado, cemento, brikoj kaj tegoloj, vegetaĵ-oleo, farun-muelado ktp. kaj hidroelektrejoj; kaj ankaŭ ĝiaj aferoj de kulturo, edukado, scienca esplorado kaj publika higieno ricevis grandan progreson.

Pli profunda ŝanĝiĝo estas, ke en Tibeto emergis la unua generacio de dekmiloj da laboristoj kaj granda nombro da kadroj, el kiuj 1,200 personoj sin okupas pri gvidaj oficoj de distriktestro, guberniestro kaj subregionestro. Frakasinte la kruelan malluman sistemon de feŭdismo kaj servutismo, la servutuloj kaj sklavoj, kiuj havis nenian rajton kaj personan liberon dum generacioj, nun levadas Tibeton en la vicon de modernaj socioj per siaj saĝo kaj laboro.

La nova Tibeto estas marŝanta grandpaŝe antaŭen!

La Red.



GUANG GIUNT

**NOVA TAĴDO
EN
PRODUKTADO
KAJ KONSTRUADO**

Riĉa rikolto de tritiko en la ĉirkaŭurbo de Pekino.

LA Ĉina Popola Respubliko travivas sian 16-an jaron en 1965. Kun la komenciĝo de la jaro, la tuta afero de socialisma konstruado de la lando eniris tute novan etapon, karakterizatan per bonega situacio en ĉiuj sferoj. Komencante de apartaj regionoj, nova alta tajdo de produktado kaj konstruado en industrio kaj agrokulturo jam formiĝis iom post iom tra la tuta lando. Kaj tiu alta tajdo sane disvolviĝas nun kun longdaŭra karaktero.

LEVIĜO DE PRODUKTA NIVELO

En agrokulturo, la somerrikoltaj plantoj, kiuj okupas trionon de la jara agrokultura produkto, donis kompare pli bonan rikolton en la plejparto de la lando ol en ĉiuj lastaj jaroj. En la provincoj Henan, Ŝenhi, Hubej, Anhuj, Siĉuan, Giangsu, Ŝanhi kaj la urbegoj Pekino kaj Ŝanhajo, oni pliproduktis je 10 ĝis 20 procentoj. En la provincoj Ŝandong, Hebej, Ĝegiang kaj Hunan, kvankam estis tropluvado dum semado en la lastjara aŭtuno kaj oni reduktis la semad-areon de somerrikoltaj grenoj favore al verdaj sterkoj, tamen la vasta amaso de komunumanoj plenforte intensigis la surkampan flegadon, tiel ke la po-mua produktokvanto pliiĝis kaj la totalaj produktoj estas proksimaj aŭ egalaj al tiuj de la lasta jaro. Ankaŭ la aliaj provincoj kaj regionoj havas en malsamaj gradoj pliprodukton kompare kun la lasta jaro.

Krome aperis multe da altproduktaj tipoj de granda areo. Ili ne limigas sin en la kadro de unu brigado aŭ en unu komunumo, sed ampleksas, dekmilon, dekmilojn aŭ eĉ centmilojn da muoj: alta produkto en vasta surfaco. En ĉiuj la provincoj Henan, Siĉuan kaj Ŝenhi kaj la urbegoj Pekino kaj Ŝanhajo, aperis tiaj tipoj de grandarea altprodukto.

En la provincoj Siĉuan, Junnan, Gujĝoŭ kaj Hunan kaj en la ĉirkaŭurbaj distriktoj de Ŝanhajo, oni havas kompare pli grandan kreskon en la produktokvanto de kolzo. Samtempe, la plant-areo de frua rizo kaj la semad-areo de oleaj, sukeraj, fibraj (kanabo k. a.) plantoj, tabako kaj kotono ĉiuj superas en amplekso tiujn de la lasta jaro. La riĉa rikolto en somero estas la unua granda venko, kiun la 500 milionoj da kamparanoj en Ĉinio

atingis nunjare en la nova alta tajdo de agrokultura produktado.


En agrokultura akvoutiliga konstruado, oni ankaŭ multe atingis en la unua duono de la jaro ĉie en la lando. La formado de ŝtupaj kampoj kaj forstado multe progresis ĉijare en centoj da gubernioj (flagoj), kiuj troviĝas en Gansu, Ŝenhi, Ŝanhi, Ninghia, Kinghaj kaj Interna Mongolio ĉe la meza baseno de la Flava Rivero kaj estas unuoj speciale zorgantaj pri konservado de akvo kaj grundo.

Kun la formiĝo de la nova alta tajdo de agrokultura produktado, plene disvolviĝas ankaŭ la industria produktado kaj konstruado. En la unua duono de ĉi-jaro, oni vidis relative grandan kreskon en la kvanto de la plejparto de la produktoj tra la lando kompare kun tiu en la sama periodo de la lasta jaro. De ĉefaj produktoj la kvanto estas ĝenerale plenumita je pli ol duono de la jara plano. Inter ili plej rapide kreskis la produktoj por agrokultura uzo. Kompare kun la sama periodo de la lasta jaro, la produktokvanto de kemiaj sterkoj kaj agrokulturaj maŝinoj pliiĝis ĝenerale je 30 ĝis 40%. Ankaŭ la ĉefaj produktoj de la malpeza industrio kiaj koton-fadenoj, sukero kaj salo tre rapide kreskis. Inter fundamentaj industrioj, plenampleksan pliprodukton havas ankaŭ ŝtalo, fero, petrolo, koloraj metaloj, bazaj kemiaĵoj kaj konstrua materialo.

La kvalito de pliparto de industriaj produktoj stabiliĝis aŭ plialtiĝis. Novajn varspecojn kalkulitajn laŭ dekmilo oni sukcesis provprodukti. Inter ili iuj estas internacie plej novaj. La produktokosto de multaj fabrikaĵoj reduktiĝis kaj la laborproduktiveco multe plialtiĝis. Samtempe, la skalo de la baza konstruado de industrio estis pli granda ol tiu de la lasta jaro. Ekzemple en konstruado de karbominejoj, 16 novaj ŝaktoj estos transdonitaj al produktado. En ŝpinteksa industrio, inĝenieraj laboroj de 46 gravaj konstruobjektoj estas en progresado.

SOCIALISMA PRODUKTA KONKURSO

En la nuna jaro varme disvolviĝas en nia vasta lando, de urbo ĝis kamparo kaj de industrio ĝis agrokulturo, movado de socialisma produkta konkurso por interkompari kaj



Ŝtalaj radringoj de vagonoj en premfarado.

lerni de, antaŭenkuri ĝis la avangarduloj kaj helpi al postĝintoj.

Ĉie en la kamparo de la lando oni fervore lernas la spiriton de Daĝaj (vidu "La Vojo de Daĝaj", E.P.Ĉ., N-ro 2, 1965, p.65) kaj jam stariĝis nombro da tipaj avangardaj altproduktaj unuoj. Ju-gubernio de Ŝanhi-provinco estas bona ekzemplo ĉi-rilate. La Dianŝang-brigado de Hiaŭĝiahuej-komunumo de la nomita gubernio konsistas el pli ol 50 familioj kaj havas sume pli ol 300 muojn da agroj, dislokitaj sur 24 terfendegoj kaj 36 montkrestoj kaj apartigitaj en pli ol 700 parceloj diversgrandaj. Du trionoj de tiuj agroj havas maldikan grundon kun ŝtonoj sube. En spirito de "forporto de monto kaj plenigo de maro" la brigadanoj elfosis la subterajn ŝtonojn, konstruis termurojn

kaj akvobaraĵojn por reformi la grundon kaj topografion de la agroj, tiel ke la fizionomio de ilia agrokultura produkto tute ŝanĝiĝis. La spirito de Daĝaj nun floras kaj fruktas ĉie.

Sur industria fronto la movado de komparo, lerno, antaŭenkuro kaj helpo disvolviĝas pli prospere ol antaŭe. En la pastinteco tiu movado direktis sin ĉefe al plibonigo de kvalito kaj plimultigo de novaj produktoj, nun ĝi ampleksas tutan ekonomian kaj teknikan agadon. Ekzemple, la Ŝanhaja Industria Kompanio de Metalaj Produktoj dividis siajn 98 dependajn entreprenojn en 13 grupojn laŭ simileco de produktoj kaj teknologio, por ke ili periode ŝanĝu inter si spertojn kaj komparu la laborojn reciproke.

RENOVIGO KAJ REVOLUCIO DE TEKNIKO

Nunjare, la movado de teknika renovigo kaj teknika revolucio sur industria fronto karakteriziĝas per granda amplekso, rapida disvolviĝo kaj vasta amaseco. Dum la tri

unuaj monatoj ĉijare la laboristoj kaj oficistoj en Ŝanhajo entute faris 90 mil proponojn de renovigo, el kiuj 50 mil estas adoptitaj kaj aplikataj en produktado. Tiuj efektivitaj proponoj nombre superas duonon de tiuj efektivitaj dum la tuta lasta jaro en Ŝanhajo. En la aliaj urboj la vastaj amasoj de laboristoj kaj oficistoj same entuziasme partoprenas tiun movadon. La aktiveco de la vastaj amasoj por teknika renovigo kaj teknika revolucio estas jam mobilizita.

En la teknika revolucio, ĉijare estas konkeritaj certaj gravaj novaj teknikoj de internacia nivelo, ekzemple, 12,000-tuna hidraŭlika premilo, maŝino por fabriki vagonajn radringojn, altforno kun kapacito de 1513 kubmetroj, ktp. Inter la novaj teknikoj, iuj pruviĝis sukcesaj

en provfabriko kaj aliaj estas aplikataj jam en pogranda produktado. Ili ludos gravan rolon en disvolvado de industrio kaj eĉ de la tuta afero de socialisma konstruado de Ĉinio.

En la teknika renovigo kaj teknika revolucio, precipe en tiuj plej novaj, estas praktikata la metodo de kombino de trio, nome: la gvidaj kadroj, laboristoj kaj teknikistoj, kaj la entrepreno, sciencsplora instituto kaj lernejo, respektive. Tia labormetodo de amaslinio ludas decidan rolon en konkerado de gravaj novaj teknikoj.

En apliko de tiu metodo, la teknikistoj lernis de la laboristoj multajn praktikajn sciojn pliriĉigante sian teorian scion, aliflanke, ankaŭ la laboristoj lernis multon de la teknikistoj por altigi sian kulturan kaj teorian nivelon.


UNUE LA KVALITO

Zorgi unue pri la kvalito de produktoj estas elstara trajto kaj ankaŭ grava marko de la nova alta tajdo de la industria produktado kaj konstruado ĉijare.


Jam de la jarkomenco, industria, minekspluataj kaj aliaj entrepreno en diversaj lokoj de la lando vaste kaj ripete faris edukadon pri la graveco de kvalito inter la laboristaj kaj oficistaj amasoj. Varmaj diskutoj okazis

inter ili. En tiuj diskutadoj oni ĝenerale faris konkretan analizon en strikta ligo kun la reala stato de la koncerna entrepreno. En la entrepreno, kies produktoj jam atingis la kvalitan normon fiksitajn de la ŝtato, oni ĝustatempe atentigis pri evito de fiereco kaj instigis al daŭra progreso kaj plua levo de kvalito. En la entrepreno, la kvalito de kies produktoj ne povis atingi la postulatan normon, aŭ kie troviĝis pli malpli gravaj demandoj en produktado, oni serioze analizis la kaŭzojn kaj pristudis kaj alprenis efikajn rimedojn por plibonigi la laboron.

La gvidaj kadroj kaj teknikistoj en multaj entrepreno profunden venis en la laborejojn



Manotenaĵaj traktoroj Tipo "Gongnong" 1, produktitaj de la Traktora Fabriko de Ĉangĝoŭ, Giangsu-provinco, estas taŭgaj por kultivado en legomĝardenoj kaj ŝtupaj kampoj.



Radringoj sendataj al alia laborejo por plua prilaborado.

kaj laborgrupojn por studi kaj resumi spertojn de laborprocedoj kune kun la laboristoj, malkovri problemojn, ĝustatempe solvi ilin kaj plialtigi la kvaliton de produktoj. Ekzemple, la kupraj valvo-korpoj produktitaj de la forĝista laborejo de la Hangĝoŭ-a Fabriko de Oksigenproduktaj Maŝinoj en Ĝeĝiang-provinco kvalite ne povis atingi la fiksitan normon eĉ por duaklasa kvalito dum longa tempo. Ĉijare, la gvidaj kadroj de la fabriko venis al tiu laborejo por restadi tie laborante dum certa periodo. Post persona surloka observado, analizado kaj studado, oni decidis uzi elektran fornon anstataŭ la karba por varmigado. Rezulte pli ol 95% de la produktitaj valvo-korpoj atingis la normon de unuaklasa kvalito.

REVOLUCIIGO DE ADMINISTRADO


Por kontentigi la novajn postulojn de la nova disvolviĝo de produktado kaj konstruado, estas energie disvolvita en industriaj kaj minekspluataj entreprenojoj de la lando la movado de revoluciigo de entreprenojoj kun celo reformi

la administran laboron kaj senĉese levi la nivelon de administra laboro.

La revolucio de la administrado de entreprenojoj estas efektivigita laŭ la principo kaj spirito — ĉio por la bazaj laborunuoj, produktado kaj amasoj — per rereguligo de la strukturo kaj personaro, reformo de malraciaj reguloj kaj sistemoj, malpliigo de kunvenoj, raporttabeloj kaj skolastikaj formalajoj, por ke la gvidantaro de la entrepreno povu pli bone servi al la bazaj laborgrupoj kaj laboristoj. Bonan ekzemplon donis en tio la Cichar-a Fabriko de Lokomotivoj kaj Vagonoj en Hejlongĝiang-provinco.

La partopreno de fizikaj laboroj de la kadroj estas grava signo de revoluciigo de entrepreno. En multaj industriaj kaj minekspluataj entreprenojoj estas praktikata la sistemo de partopreno de fizika laboro de la kadroj laŭ fiksita tempo, fiksita laborposteno, fiksita respondeco kaj normo de efektiva laboristo. Dum la partopreno de fizika laboro, ĉiuj kadroj klopodas kiel eble plej rapide posedi unu aŭ kelkajn produktajn teknikojn. Tiu sistemo ebligas al la kadroj konservi kaj


La sinteza kaj malkompona sekcio de la ureo-produkta laborejo nove konstruita en la Ŝanhaja Vuding-a Kemi-fabriko.



disvolvi por ĉiam la bonan revolucionan tradicion de la proletaro.

La nunjara nova alta tajdo de produktado kaj konstruado en ĉina industrio rezultis el tio ke la vasta laborista amaso tenis alte la ruĝan flagon de la penso de Maŭ Zedong, persistis ĉe la Ĝenerala Linio streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie, kaj ke oni unuapaŝe resumis la sperton de ekonomia konstruado de la nova Ĉinio, unuapaŝe ekkonis la leĝojn de organizado de produktado kaj konstruado, disvolvis kun klasbatalo kiel spino la tri revolucionajn movadojn de klasa batalo, produkta batalo kaj scienca eksperimentado, kaj precipe la movadon de socialisma edukado.

Nun la laboristaj kaj kamparanaj amasoj sur diversaj produktaj frontoj, plenplenaj de revolucia spirito, daŭre impetas antaŭen por komplete plenumi kaj superplenumi la naciekonomian planon de 1965, por plene efektivi la politikon konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie,




Liu Ĉengking (meze malantaŭe) kadro de la Kontrola Sekcio de la Ĉongking-a Hidraŭlika Turbina Fabriko deĵoras kiel laboristo en la eksperimentejo de akvturbinaj generatoroj.

kaj por fari sufiĉan antaŭpreparon por la Tria Kvinjara Plano komencota en la jaro 1966.

Diversaj ŝtofoj el kemiaj fibroj en ŝanhaja magazeno.





*Versaĵo verkita kaj man-
skribita de Prezidanto Maŭ
Zedong en jun. 1956, post kiam
li transnaĝis Jangzi-riveron.*

ESTIS tago en la mezo de junio de 1964. La Dektrimaŭzolea Akvorezervejo prezentis plej grandiozan bildon kun siaj ĉarme bluaj montoj kaj smeralde verda akvo.

Iom post la 3-a horo posttagmeze, du aŭtomobiloj haltis sur la sudokcidenta bordo. Du afabluloj altstaturaj elvenis kaj komencis proksimiĝi al la akvo per firmaj kaj fortaj paŝoj.

La gestudentoj de pekinaj altlernejoj kaj batalantoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, naĝantaj en la artefarita lago, demalproksime jam rekonis en ili la amatajn Prezidantojn Maŭ Zedong kaj Liu Ŝaŭki, kaj tuj ektondris ĝojkrioj el la popolamasoj:

“Prezidanto Maŭ venas naĝi!” “Prezidanto Liu venas naĝi!”

Vidante ke Prezidanto Maŭ kaj Prezidanto Liu estas brile sanaj kaj tre viglaj, la gejunuloj forgesis, ke ili estas en akvo, kaj eksaltis kaj mansvingadis pro ĝojo. Akveroj disŝpruciĝis kaj oraj sunetoj gaje dancadis sur la akvo. Iu studento de la Pekina Fizikokultura Instituto ekkriis nesindeteneble, alte levante sian manon: “Vivu Prezidanto Maŭ!” Kaj tuj lin sekvis tondra vivuado de la amasoj, kiu transflugis la lagon kaj estis kune ripetita de la ĉirkaŭstarantaj montgigantoj.

Kvazaŭ fortaj kaj lertaj ŝtormobirdoj la gejunuloj konkure naĝis trans la akvosurfacon al la grandaj gvidantoj. Prezidanto Maŭ afable mansvingadis al ili, kaj ĉirkaŭrigardinte la vastan lagon levis la dekstran manon, montris malproksimen kaj diris al ili:

“Ni transnaĝu tien!”

Fendante la verdan vaston per la brakoj, Prezidanto Maŭ kaj Prezidanto Liu naĝis antaŭen ŝultron ĉe ŝultro. Ili sin movis jen surdorse, jen sur unu flanko, facile kaj senĝene. La gejunuloj ilin sekvis tuj poste, kaj sin puŝis antaŭen tra la ondoj.

Dum la antaŭeniĝado, Prezidanto Maŭ kaj Prezidanto Liu intime interparoladis kun la gejunuloj ĉe siaj flankoj, demandante ilin pri iliaj laboroj kaj lernado.

DE PREZIDANTOJ MAŬ KAJ LIU DEKTRIMAŬZOLEA AKVOREZERVEJO

Korespondantoj de la Ĵurnaloj "Fizikokulturo" kaj "Jiefangjun Bao"

"Ĉu foje vi naĝis en sepa-grada ventego?" demandis Prezidanto Maŭ al la gejunuloj. Kaj ĉi tiuj respondis: "Ne". Prezidanto Maŭ ekprenis staran naĝmanieron kaj gestante per unu mano li demandis: "Ĉu foje vi naĝis tra ondegoj kun la alteco de homo?" La gejunuloj denove diris: "Ne." Tiam li diris: "La sporto de naĝado estas batalo kontraŭ la naturo. Vi devas iri al la grandaj riveroj kaj vastaj maroj por vin hardi." Kaj Prezidanto Liu diris al la gejunuloj: "La tegmentitaj naĝejoj estas nur varmdomoj. Vi devas vin ekzerci en Jangzi-rivero kaj en la vasta lago Bajjangdian." "Ni nepre nin hardos tra ventegoj kaj ondegoj!" unuvoĉe respondis la gejunuloj.

Tiel babilante kaj naĝante, ili alproksimiĝis al la insuleto meze de la akvorezervejo. Iu proponis, ke Prezidanto Maŭ iom ripozu sur ĝi. Sed prezidanto Maŭ ankoraŭ ne tute kontentigis sian naĝemon kaj sin direktis plue orienten. Sciante, ke oriente de la insuleto la akvo estas pli profunda kaj malvarma pro ekzisto de fontoj, la gejunuloj iom maltrankviliĝis. Sed tiu maltrankviliĝo tuj pasis, ĉar ili ekmemoris, ke Prezidanto Maŭ plurfoje transnaĝis Jangzi-riveron kaj naĝis en vintro en Jonggiang-rivero, kiam ĝia temperaturo estis nur 17½ gradoj. Kuraĝigite de siaj grandaj gvidantoj, ankaŭ la gejunuloj sin puŝis antaŭen lin sekvante.

Prezidanto Maŭ faris longan rondnaĝon ĉirkaŭ la insuleto antaŭ ol surbordiĝi al ĝi. La bordo estis kruta kaj senvoja, kaj supre de la kruta deklivo estis vertikala pinto kun ebena supro. Ĵetinte rigardon al la supro, Prezidanto Maŭ diris: "Supren!" Tion dirinte, li faris vojeton tra la herbaĉoj kaj ŝtonoj kaj supren sin levis paŝon post paŝo ĝis la plej alta supro.

Tie starante la prezidanto faris aprezan ĉirkaŭrigardon al la bela pejzaĝo,

Sur la sunplena ebena supro, li ĝuis sunbanon kune kun la gejunuloj. Dume iu raportis al li, ke multaj trupoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo ellernis naĝadon en plena armato. "Tre bone," diris Prezidanto Maŭ, "la trupoj devas scipovi naĝadon."

Kiam Prezidanto Maŭ malsupreniris de la ebena supro, boato alproksimiĝis por porti lin kaj Prezidanton Liu returnen. Sed ili rifuzis la proponon ĝoje dirante: "Ni naĝu returnen!"

Revenvoje, subite ekventis kaj ekludis ondoj. La neŝarĝita boato saltadis kaj ne povis rapide moviĝi antaŭen. Sed la Prezidantoj naĝis surdorse antaŭen, senĝene kaj aplombe kontraŭante la ondfrapojn per siaj ŝultroj. Kaj dume ili babilis gaje kun la junuloj, jen kaj jen skuante la aeron per sonoraj ridoj.

Ekblovis malvarma vento. Prezidanto Maŭ demandis la junulojn: "Ĉu vi timas?" "Ne!" ili respondis unuvoĉe, "nin ne timigos eĉ multe pli grandaj ventoj kaj ondoj!" Aŭdinte iliajn vortojn, Prezidanto Maŭ kaj Prezidanto Liu ekridis kontente.

Naĝinte ankoraŭ iom da tempo, Prezidanto Maŭ metis siajn ambaŭ manojn sur la bruston kaj komencis senĝene ripozi kuŝante sur la akvo. Vidante, ke li povas longe flosi sen movado de la membroj, la junuloj ĉiuj komencis lin imiti. Prezidanto Maŭ instruis al ili teni sin en ekvilibro malgraŭ ventoj kaj ondoj. Li diris al ili: "Oni povas longe persisti, nur se oni scipovas ripozi."

Dume, kelkaj junulinoj alproksimiĝis de malantaŭe. Ilin vidante, Prezidanto Maŭ diris ridante: "Ŝanĝiĝis la epoko, kaj la viroj kaj virinoj fariĝas egalaj. Kion la kamaradoj povas, tion povas ankaŭ la kamaradinoj... Aŭdinte la laŭdon de la gvidanto, la junulinoj tre kuraĝiĝis kaj ekridis gaje.

Kiam Prezidanto Maŭ kaj Prezidanto Liu surbordiĝis, jam estis post la 5-a. En la montvala vento gaje saltadis la ondoj. Kvankam la Prezidantoj naĝadis tiel longe, ili tamen aspektis tute senlacaj kaj viglanimaj. Vidante, ke la grandaj gvidantoj estas tiel sanaj, kaj pensante pri iliaj prizorgoj kaj espero al la junularo, la gejunuloj sentis senliman ĝojon. Ili diris al siaj amataj gvidantoj: Karaj kaj estimataj gvidantoj, ni nepre obeos viajn vortojn, iros nin hardi en grandaj riveroj kaj vastaj maroj, en la ventegoj kaj ondegoj de la revoluciaj bataloj por fariĝi sentimaj batalantoj kaj neniam degenerontaj daŭrigantoj de la proleta revolucio!

KONKURSO INTER FABRIKOJ DE PEKINO KAJ TIANGIN



Han Jing (la dua de dekstre) de la Pekina Vino-Fabriko helpas al la laboristoj de la Tiangina Vino-Fabriko por trovi la kaŭzon de apero de diversaj mikroboj kaj ĝin elimini.



LA du modernaj urbegoj Pekino kaj Tiangin en la Nordĉinia Ebenejo, kun interdistanco de nur malpli ol 140 kilometroj, estas intimaj najbaroj.

Inter fabrikoj de tiuj du urboj komenciĝis jam en 1964 kunlabora konkurso pri samspecaj produktaĵoj de malpez- kaj meti-industrioj, sub la devizo “komparu, lernu, kuratingu kaj helpu”.

En 1965, la konkurso disvolviĝis en vastan amas-movadon, en kiu partoprenis 117 fabrikoj. Dum la konkurso, sincera interhelpo kaj fervora lernado iras inter la fabrikoj de la du urboj, kaj ofte veturas iliaj senditoj sur la vojo inter Pekino kaj Tiangin, kio pliiintimigis la kunbatalantan amikecon inter la du urbegoj en la nova alta tajdo de produktado, kiu estas uverturo de la Tria Kvinjara Plano komen-



Han Dianji (maldekstre), sekciestro de la Unua Filio de la Pekina Plasta-fabriko klarigis sian produktan sperton al tianginaj laboristoj.



Veterana metiartisto de la Pekina Eburosskulptejo instruis la arton de skulptado en la Tiangina Produkta Kooperativo de Specialaj Metiartaĵoj.

cota en 1966. En multaj fabrikoj cirkulas anekdotoj pri reciprokaj komparado kaj lernado, helpado al postiĝintoj kaj klopodado por kuratingi antaŭirantojn, por ĝenerala altigo de la produktonivelo.

KOMUNIGO DE TEKNIKO

Antaŭ la Liberiĝo cirkulis la proverbo “Samspecaj firmoj kaj fabrikoj — reciprokaj malamikoj”, kiu bone spegulis la rilatojn inter la kapitalismaj entreprenoj de la malnova Ĉinio. Sed en la nova Ĉinio, la socialismaj entreprenoj samspecaj interrilatiĝas kiel fratoj, kiuj helpadas unu la alian.

La Vuĝou-a Kemifabro de Tiangin kaj la Pekina Kemifabro por Ĉiutagaj Vivbezonaĵoj ambaŭ produktas dentopastojn, kiuj estas vaste vendataj en la du urboj. La Vuĝou-a Kemifabro sukcesis produkti 5 novajn specojn de dentopasto post pli ol 200-foja provado dum unu kaj duona jaro. Tiam ĝi informiĝis, ke la pekina fabriko renkontis teknikan malfacilon en sia provfabrikado de tia dentopasto. Se tio okazus en la malnova socio, la tiangina fabriko certe firme tenus sian sekreton kaj prenis la okazon kiel bonan ŝancon por konkurenci kaj ĉasi altan profiton. Sed nun ĝi sendis siajn teknikistojn kaj laboristojn kun la receptoj de la novaj dentopasto kaj kvar specoj de raraj materialoj al la pekina fabriko por ĝin helpi. Dank’ al tio, la lasta baldaŭ sukcesis en sia provprodukto sen zigzaga palpirado, kaj nun

ĝi produktas po-grande du specojn de tia nova dentopasto.

En produktado de jadaĵ artaĵoj de homfiguroj, la skulptarto de la Pekina Jadaĵ-fabriko estas pli alta ol tiu de la Tiangina Produkta Kooperativo de Specialaj Metiartaĵoj. Por levi la artnivelon de la lasta, la Pekina Jadaĵ-fabriko sendis tien majstron Vang Jonghaj. Tiu veterano metiarta havas unikajn teknikojn de jadskulptado, kiujn li tenadis en sekreto dum la malnova socio. Sed nun veturinte al Tiangin, li malfermis kurson por lernigi senrezerve siajn teknikojn al la laborantoj de la nomita kooperativo, kaj pro tio li ricevis de ili varmajn bonvenigon kaj amon.

DE POSTIĜINTO AL ANTAŬIRANTO

Pasintjare, en kunveno por kompari kaj juĝi fabrikojn de malpezaj industrioj en norda kaj nordokcidenta Ĉinio, la sandalo de la Pekina Plastaĵ-fabriko estis juĝita kiel la plej bona el la samspecaj produktaĵoj, kaj tiu produktita de la Tiangina Fabriko de Porinstrumentaj Plastaĵoj kiel la dua.

Sed, antaŭe, la plasta sandalo de la unua estis multe malpli bona ol tiu de la lasta, kaj en formo kaj en kvalito.

La Pekina Plastaĵ-fabriko havas pli bonajn ekipaĵojn, kaj ĝi tre fieris pri tio. Tio malhelpis ĝin humile lerni de aliaj. Plurfoje ĝi sendis laborantojn al ŝanhajaj kaj kantonaj fabrikoj por

lerni utilajn spertojn, sed la senditoj nur faris rigardon kaj ne trovis sperton vere utilan.

Kiam okazis la konkurso pri samspecaj produktajtoj inter Pekino kaj Tiangin, ĝi denove sendis laboristojn al Tiangin. Tri tagojn post kiam ili atingis la tian fabrikon, ili proponis, ke ili faru provprodukton per ĝiaj maŝinoj, por pavi pri sia tekniko, kiun ili opiniis neniom malpli bona ol tiu de la tiangin-a fabriko. Sed kontraŭe al ilia imago, per sia manipulado ili montris ĝuste sian mankon, kiun ili ne konis dum longe. La sandaloj produktitaj de tiangin-aj laboristoj estis bonaj, dum tiuj, kiujn ili mem fabrikis per la samaj maŝinoj surhavis fendetojn kaj makulojn.

La fakto donis fortan lecionon al la senditoj de la Pekina Plastaĵ-fabriko. Ili ekkomprenis, ke oni ne povas akiri veran scion, se oni ne lernas humile kaj diligente kiel element-lernejano. Ili humile petis konsilojn de tiangin-aj laboristoj, kaj lernis de ili multe da valoraj spertoj. Post tio, la Pekina Plastaĵ-fabriko altigis sian teknikon kaj venkis plurajn grandajn malfacilojn en plibonigo de la produkta kvalito.

Sed nelonge poste, alia problemo denove baris al ĝi la vojon: sur la sandaloj aperis fendo ĉe la junto de la muldilo. La laboristoj multe klopodis por ĝin solvi, sed vane.

Ĝuste kiam ili estis turmentataj de la kaprompa problemo, iliaj tianginaj kamaradoj sendis al ili du veteranajn laboristojn por ilin helpi. La spertuloj venis al ili spite al pluvo kaj tuj esploris la maŝinojn. Ili faris sulkon en la muldilon kaj per tio solvis la problemon.

Sub la influo de tia varma helpo, la Pekina Plastaĵ-fabriko des pli modeste kaj aktive lernas progresintajn teknikojn kaj labormetodojn de

frataj fabrikoj. Dank' al tio, ĝi rompis multajn barojn sur la vojo de plibonigo de produktokvalito kaj faris grandan antaŭensalton de la pozicio de postigiĝinto al tiu de antaŭiranto.

KUNE BATALI KAJ ANTAŬENMARŜI

Mi aŭdis ankaŭ kortuŝan historion pri la Tristela Krajonofabriko de Pekino kaj la Tiangina Krajonofabriko. En la pasinteco, ili ambaŭ postrestis kompare kun la ŝanhajaj fabrikoj en tabulsegado. Kvankam ili jam lernis spertojn de Ŝanhajo, kaj faris aranĝojn por bonigo, tamen ili ne kontentige solvis la problemon de segado.

Lastjare, kiam la samprodukta konkurso komenciĝis inter la du fabrikoj, ili decidis kune solvi tiun problemon kaj por tio elektis 10 teknikistojn kaj veteranajn laboristojn. Dank' al la kuna kaj koncentra klopodado, finfine ili venkis la malfacilon en produkto kaj altigis la produktonivelon de tabulsegado preskaŭ ĝis tiu de Ŝanhajo.

Alia ĝojiga informo venis el la Tiangina Fontopluma Fabriko kaj la Pekina Orstela Fontopluma Fabriko. Antaŭe, la procento de la laŭnormaj ŝtalaj plumĉapoj fabrikitaj de la unua estis pli alta ol tiu de la lasta, dum la lasta superis la unuan en fabrikado de plumbekoj. Dank' al reciproka helpo ili ĉiuj forigis sian respektivan mankon kaj faris grandan paŝon al la avangarda nivelo tutlanda.

Nun vikle disvolviĝas la konkurso inter la fabrikoj de malpez- kaj meti-industrioj de Pekino kaj Tiangin. Akcelante unu alian por kuna progresado, ili energie klopodas atingi pli brilajn sukcesojn por celebri la deksekan naskiĝfeston de sia Respubliko.

Kuriozaj Bestoj

ĈINA ALIGATORO

(*Alligator Sinensis Fauvel*)

La ĉina aligatorio estas kurioza rampulo, vivanta en Anhuj- kaj Giangsu-provincoj de la malsupra Jangzi-rivero. Ĝi vivas en bambuaro aŭ kreskejo de fragmitoj kaj konstruas por si kavernan neston tre longan kaj profundan, kun diversaj aperturoj kondukantaj al akvo aŭ tero, kaj, iuj speciale por preni aeron.

Ĝi metas ovojn sur tero en junio aŭ julio, kaj vintrodormas en la

nesto. El ĝia haŭto oni faras diversajn belajn ledaĵojn, kiaj mansakoj, kestoj k. s. Ĝi estas malofta besto havinda por zooparko.

F A B L O

LUPO KAJ PEGO

Irante en arbaro lupo ekvidis, ke iu pego forte bekadas la ŝelon de arbo. Ĝi sidiĝis kaj diris serioze: "Ho ve! Kiel loĝanto de la arbaro, mi ja ne povas neglekti tian kruelaĵon! Pensu, sinjoro Pego, kian barbaraĵon vi faras por kontentigi vian personan deziregon disŝirante

la haŭton de la arbo. Se ĝi povus paroli, ĝi laŭte akuzus vin pri via krimago!"

Post tiuj severaj vortoj, la lupo diris mildvoĉe:

"Mi estas plej firma oponento de malhumanaĵoj. Diru, ĉu vi foje vidis ligneron aŭ oston ĉe mia nesto?"

"Ne, bonkora sinjoro, tio ja ne troviĝas ĉe via nesto," respondis la pego fiksrigardante la lupon. "Mi tamen foj-refoje trovis, ke vi formanĝegis, sen restigo de sango aŭ ostoj, ne nur leporojn kaj ŝafidojn, sed eĉ viajn vunditajn kunulojn! Ne necesas ke vi mem vin laŭdu, ĉar ja ĉiuj nun diskonigas vian lupan bonmoralecon!"

AROMAS

RIZO

RIVERBORDE

*Ĉe Ji-river' kaj Ŝu-rivero
Nun ĉie rizo en prospero.
Jen pitoreske ĉarmas tero
De l' norda land' per nova belo.*

Tra la bordoj de la du paralelaj riveroj Ji kaj Ŝu sur la Ŝandong-a Duoninsulo, nun ĉie aŭdiĝas laŭdaj kantoj de la loĝantaro pri ilia hejmloko.

Nun la baseno de tiuj du riveroj jam fariĝis regiono abunda je rizo. Sur la senlime vasta akvokampano aromas verdverdaĵoj rizplantoj. Ore brilas en sunlumo akvorezervejoj kaj disetendiĝas irigaciaj kanaloj kiel reto. Super la vasta verdejo flirtas bruoj de pumpmaŝinoj, akvomurmuro kaj ridoj kaj kantado de la laborantaj komunumanoj. Kia viglo kaj agrablo!

ALVOKO AL REFORMO DE LA NATURO

Antaŭ ok jaroj, la granda gvidanto de la ĉina popolo, Prezidanto Maŭ skribis en sia noto pri la raporto de la Daŝana Agrikultura Kooperativo

de Gjunan-gubernio, Ŝandong-provinco: "Ligia-vilaĝo estas bona ekzemplo por reformi Ĉinion per la montranslokiga spirito de la Malsaĝa Avo*." Liaj vortoj ĝuste taksis la impetan spiriton de la popolanoj de Ligia-vilaĝo, kiu apartenis al Daŝan-kooperativo, kaj klarigis alvokas la sep milionojn da popolanoj de Linji-regiono al batalo kontraŭ la naturo.

En du jaroj, la heroa popolo de Ligia-vilaĝo ebenigis dek montetojn, traboris tri montojn, ŝanĝis river-fluejojn kaj reformis kampojn facile subakviĝajn montdeklivojn en riĉrikoltajn kampojn. La alvoko de Prezidanto Maŭ kaj la heroaĵoj de la popolo de Ligia-vilaĝo rapide disfamiĝis tra Linji-regiono. Ekde tiam leviĝis grandioza amasa kampano por reformi la naturon.

Depost la jaro 1957, la popolo de Linji-regiono unuapaŝe reformis per siaj diligentaj manoj pli ol 3000 montojn por ke akvo, grundo kaj sterko estu konservataj, jungis 18 riverojn inundemajn kaj servis ilin al agrikulturo. Kaj krome en la montregiono de Jimeng-montaro konstruiĝis pli ol 30 grandaj, mezgrandaj kaj malgrandaj akvorezervejoj kaj irigaciaj kanaletoj longaj je pli ol 13,000 km., kaj ĉirkaŭ 7,000,000 muoj da facile superakvigeblaj, malfekundaj kaj surmontaj kampoj estis

**Ĉina antikva fablo rakontas, ke iu Malsaĝa Avo translokigis du montegojn dank' al firma volo kaj persistemo.*

Gegoŭ-kluzo, konstruata sur la rivero Ji por elkonduki ĝian akvon kaj ŝanĝi pli ol cent mil muojn da facile inundebla tero en rizkampojn.



reformitaj en bonajn kaj modelajn kampojn, kiujn povas minaci nek sekegeco nek superakvo.

En Linji-regiono aperis miloj kaj miloj da Ligia-vilaĝoj. Ili alte tenas la standardon “reformi Ĉinion per la monttranslokiga spirito de la Malsaĝa Avo” kaj kreis miraklojn vere mirindajn.

GLORA TRADICIO

La baseno de Ji-rivero kaj la Jimeng-montara regiono estis bazloko dum la Kontraŭjapana Rezistmilito. Dum la malfacilaj militaj jaroj, la tieaj popolanoj spertis brilan revolucionan luktadon. Kun pafilo en unu mano kaj sarkilo en la alia, ili batalis ĉefronte helpe al la ĉefforto, kaj klopodis postfronte produkti energie por garantii provizadon al la fronto per necesajoj. Kiam Ĉiang Kajŝek-aj banditaj trupoj lanĉis koncentran ofensivon kontraŭ la liberigita regiono de Ŝandong, ili ekstermis, kune kun la Ĉina Popola Liberiga Armeo, en la batalo ĉe Menglianggu, la tutan 74-an divizion, kiu estis unu el la elitaj trupoj de Ĉiang Kajŝek. La tiea popolo skribis sian brilan paĝon en la historio de la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj la Liberiga Milito.

HEROA POPOLO

Tia popolo, kiu havas gloran revolucionan tradicion kaj manifestis sistemon kaj sentimecon en longa luktado kontraŭ la malamikoj, certe povas venki la naturon dum la konstrua periodo.


En la jaro 1949, la popola registaro donis sumon da mono al la tiea popolo por helpi ĝin jungi Ji- kaj Ŝu-riverojn. Sed tiam la Liberiga Milito estis tuj enironta la stadion de tutlanda triumfo kaj granda kvanto da homfortoj kaj materialoj estis bezonata por la frontoj, oni povis entrepreni nur malgrandajn konstruojn por malfortigi la superakvegojn de la riveroj.

La konstruado por radikale subjugi la du riverojn komenciĝis nur post la komunumigo tra la tuta lando en 1957-1958. La grandioza laboro de monthakado estis persiste daŭrigata de la kadroj kaj popolanoj tiel en frosta vintro kiel en brule varmega somero. En la vintro de 1957, kvankam la vetero estis ĝisoste malvarma kaj neĝvento blovis de tempo al tempo, la laborantoj sur la konstruejo tamen ŝvitadis tutkorpe pro senlaca fortostreĉado. Ruĝaj flagoj flirtis sur la montoj, tondraj horuk-ado kaj kantsonoj eĥis en la valoj kaj ondadis sur la ebenejo — kia grandioza sceno! Sub la gvido de la brigadestro Li Jongkian, aro da fortaj junuloj sturmis ĉie kie aperis plej grandaj malfaciloj. Spite al la tranĉe frosta vento, ili demetis siajn vatitajn vestojn kaj jen monthakis per pioĉoj jen masonis riverbarajon. Manoj de iuj el ili vundiĝis, sed ili persiste daŭrigis la laboron post bandaĝado. Pro tio ili ricevis la gloran titolon “Ŝtala Sesa Brigado”. Dek kelkaj junuloj sub la gvido de kompartiano Guo Ĉuanhjuan prenis sur sin la taskon verdigi Meng-monton. Sur la kalva monto

Riĉan rikolton de rizo ĝuas la Orient-Gangtun-a Produkta Brigado de la Datajping-a Popola Komunumo en Linji-gubernio.



Dum la pasintaj 8 jaroj, la popolo de Linji transformis milionojn da muoj da facile inundebla tero en kamparon fruktodonan spite de sekegeco aŭ superakveco. Jen komunumanoj ĝin sterkas.



ili fosis unu post alia skvamformajn kavojn per ŝtalaj boriloj, plenigis ilin per tero kaj plantis en ili arbidojn. Post kvarjara penlaboro, ili fine beligis la monton per verdaj arbaroj.

La popolo de Linji-regiono havas altan idealon krei sian belan estontecon sin apogante sur siaj propraj fortoj spite al ĉiaj malfaciloj. Por ili ne ekzistas malfacilo nevenkebla nek afero nefarebla.

En la pasintaj ok jaroj, la popolo de la regiono entreprenis kolosan sintezan konstruadon en transformado de montoj, akvokonservado, forstigado kaj reformado de kampoj. Por tio 450,000,000 juanoj estis elspezitaj, kies 80% ili mem pagis kaj la ŝtato investis nur 20% de la totala sumo. Tiamaniere ili starigis ruĝan standardon en norda Ĉinio en reformado de facile inundeblaj kampoj, transformado de ordinaraj kampoj en rizkampojn kaj konstruado kun la spirito sin apogi sur siaj propraj fortoj.

NOVA REGIONO ABUNDA JE RIZO


Dank' al okjara penlaborado, la popolo de Linji-regiono ŝanĝis sian hejmlokon kun herbaĉejoj, marĉoj kaj inundemaj lagetoj en regionon abundan je rizo. Antaŭe, la loĝantoj en tiu regiono ne povis produkti sufiĉe da greno por kontentigi sian bezonon kaj bedaŭris, ke ili ne vivis en la abundprodukta suda Ĉinio. Sed nun, dank' al sia luktado kontraŭ la naturo, ili ne nur jam povas produkti pli multe da greno ol kiom ili bezonas, sed ankaŭ havas rizon anstataŭ sorgon, bataton k. s., kiel sian ĉefan nutraĵon. Tio ja estas mirinda ŝanĝigo.

Riĉa rizrikolto estis akirita en sinsekvaj jaroj. En 1964, la po-mua produktokvanto de la pli ol 900,000

muoj da rizplantoj atingis pli ol 200 kilogramojn, kaj tiu de la pli ol 24,000 muoj da modelaj kampoj atingis 400, 450 aŭ 500 kilogramojn. Pli ol 2,000 produktaj brigadoj, kies produktaj kvantoj estis malaltaj, forskuis sian postĝintecon en unu jaro.

Hodiaŭ en la regiono de Jimeng-montaro kaj la baseno de Ji- kaj Ŝu-riveroj, la montoj estas kovrataj de verdaj arbaroj ligno- kaj frukto-donaj, la kampoj estas vastaj kaj bonorde aranĝitaj en bedoj kaj la komunumanoj forte impresas per siaj vigla spirito kaj abunda energio kaj kun plena memfido antaŭen marŝas en sia konstruado de pli bela estonteco.

MAPO PRI LINJI-REGIONO





Lin Hongda (dekstre) faras eksperimenton pri hibridigo de frurikoltaj rizplantoj kune kun la teknikistoj de la produkta brigado.

Ĝusta

Vojo

de

Agronomia Eksperimentado

DEK jaroj jam forpasis post mia diplomigo el la Agronomia Kolegio de Fugian, kaj ok kaj duonon de ili mi pasigis laborante en la produkta brigado Jinhi, Fuking-gubernio. Tie mi persone partoprenis en la tri revoluciaj movadoj de klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimentado. Propraokule mi vidis la rapidajn kaj grandajn ŝanĝojn de Jinhi kaj bone komprenis el mia propra sperto la instruon de Prezidanto Maŭ, ke kunligiĝo kun la laboristaro kaj kamparanaro estas la sola korekta vojo por la reformiĝo de la intelektuloj. Dum la pasintaj pli ol ok jaroj, mi trairis zigzagan kaj batalplanan vojon de progreso.

EN VILAĜON

Dum mia lernado en la diversgradaj lernejoj, mi ĉiam vivis en urbo inter la muroj de konstruaĵoj. En 1954, kiam mi venis en la vilaĝon Jinhi, mi baldaŭ jam trovis, ke mi estas senpova por venki la malfacilojn en la vivo. La estraro

de la komunumo aranĝis, ke mi manĝadu portempe ĉe la malriĉ-kamparano Ĉen Ŝihua. Kelkajn tagojn poste, mi montris mian preferon manĝi kun la instruistoj de la elementa lernejo preteks-tante, ke mi ne povas kutimiĝi al la manĝoj de la kamparanoj. La patrino de Ĉen Ŝihua baldaŭ informiĝis pri tio. Kun indigno kaj malĝojo ŝi vizitis la estron de la laborgrupo Liu Dejen kaj diris: “Eĉ guberniestro kaj subprovincestro ne ĝeniĝis manĝadi ĉe ni, sed jen tiu ĉi studento ne povas kutimiĝi al tio! Se li volas nin forlasi, mi ne retenos lin, tamen mi devas atentigi, ke estas malfacile por funkciulo bone labori por ni, se li ne gustumis la dolĉojn kaj maldolĉojn de la kamparana vivo!” Poste, k-do Liu montris al mi, ke mi ne devas havi intencon min apartigi de la popolamaso. Aŭskultante liajn vortojn mi jen ruĝiĝis jen paliĝis. Kvankam mi ankoraŭ ne povis plene kompreni lian bonvolon, fine mi tamen restis malgraŭvole.

Komence, la kamparanaro tre respektis min pro tio, ke mi estis diplomito el alta lernejo, kaj

mi mem estis fierplena, pensante ke estas tiel facile kiel manturno por mi direkti elementan agrikulturan kooperativon en disvastigo de tekniko per la scioj akiritaj en la kolegio. Mi eĉ intencis akumuli materialon por verki disertacion pri grundo. Vidante ke mi jen tie faras fosajon, jen alie prenas manplenon da tero kaj okupiĝadas en fermita ĉambro pri boteloj kaj tubetoj, la popolamaso ne povis min kompreni kaj komencis grumbli: “Longe li eksperimentis, sed nia malfekunda tero restas ankoraŭ senhelpa!” Tion aŭdinte mi preskaŭ tute malesperiĝis.

Foje, mi proponis al la kadroj kaj veteranaj kamparanoj kreskigi herbojn kaj grenplantojn alterne por fekundigi la kampojn. Aŭdinte miajn vortojn, ili ekridis amare: “Ĉe ni ne estas meznombro eĉ unu plena muo (t. e. $1/15$ hektaro) da tero por ĉiu persono, kaj vi proponas kreskigi herbon sur la duono! Ĉu tio ne signifas devigi nin plenigi la stomakon per frosta vento?”

Malagrablaĵon post malagrablaĵo mi renkontis en la vilaĝo kaj mia penso konfuziĝis pro svarmo da demandoj: Kial la popolamaso ne interesiĝas pri mia eksperimentado? Kial oni ne akceptas la proponon pri plibonigo de kultura tekniko? Kial mi ne povas solvi la problemojn, kiujn la kamparanoj petis min solvi? Verdire, mia koro jam forflugis de la vilaĝo, kvankam mi ankoraŭ restis tie.

FIKSLOĜIĜO EN LA VILAĜO

Vintre de 1955, la gubernia Agrikultura Oficejo asignis min partopreni esploradon pri la latentaj produktivo de agrikulturo. En la periodo de kvar monatoj, mi trairis ĉiujn partojn de Fuking-gubernio. Tra la enketado al la kamparanoj, mi ricevis de ili vivecan lecionon kaj mi ekkonis la komplikecon de la agrikultura produktado kaj la riĉecon de la spertoj de la kamparanoj.

Baldaŭ poste, mi estis asignita iri al Hajkoŭ por fondi novan agrokulturejon.

Ĉiuvespere, kiam mi kuŝis en lito, mi pripensadis: La Partio kaj la ŝtato kulturis min ĝis mia diplomiĝo el kolegio, mi devas fari kontribuon, sed kial mi ĉie renkontis malagrablaĵojn en praktiko?

La estro de la kulturejo divenis mian penson kaj proponis al mi legi la artikolon de Prezidanto Maŭ: “La Direkto de la Junulara Movado”. Mia penso klariĝis kaj mia enigmo solviĝis, kiam mi legis liajn trafajn vortojn: “Kio estas la kriterio por juĝi ĉu iu junulo estas revolucia aŭ ne? Kiel lin distingi? La ununura kriterio estas ĉu li volas kaj ĉu li praktikas kunligon kun la amasoj de laboristoj kaj kamparanoj.” Nur tiam mi ekkomprenis, ke mi ne povis alkiutiĝi al la kampara medio pro tio, ke mi ankoraŭ ne forlasis mian “dignan” sintenon de intelektulo kaj inter mi kaj la vastaj laborantaj popolamasoj ankoraŭ estas muro, kiu malhelpas mian proksimiĝon sente kaj ideologie al ili. Fine mi decidis, sub la gvidado de la malnovaj funkciuloj, partopreni kamplaborojn kaj humile lernadi de la amasoj.

En 1958, kiam mi revenis al Jinhi-vilaĝo, mi estis varme akceptata de la funkciuloj kaj popolamasoj. Ili trovis, ke mi multe ŝanĝiĝis: la vizaĝo, brile bruna; la vestoj, pli simplaj. Kamarado Ĉen Deŝun, la ĝenerala sekretario de la Partio, diris al mi: “Linĉjo, viaj scioj certe estos utiligeblaj kaj vi estos bonvenigata de la amasoj, se vi nur volonte laborados kune kun ili.” Aŭdinte liajn vortojn, mi hontis kaj kortuŝiĝis, kaj retrorigardinte la vojon trairitan de mi, mi sentis la neceson de ideologia reformo kaj la intimecon de la instruo de Prezidanto Maŭ. Mi do translokigis miajn edzinon kaj infanojn al Jinhi por fiksloĝiĝi ĉi tie. Mia edzino kaj mi membriĝis al la produkta brigado estrata de Lin Joŝu. Ni



Lin Hongda (meze) ekzamenas la kreskadon de la bonspaciaj rizplantoj.

lernis transplantadon de rizplantidoj, plugadon, formadon de bedoj, sterkadon ktp, kaj dume atente observadis la kulturan sistemon de la loko kaj faris detalajn notojn. Dank' al tio mi trovis la ŝlosilajn problemojn en produktado kaj decidis mian temon por studado.

LERNI HUMILE

Por sisteme lerni la spertojn terkulturajn, mi petis spertoriĉajn veteranajn malriĉ-kampanojn kaj malsuprajn mez-kampanojn* min instruadi.

En la vintro de 1958, mi trovis, ke la tritiko estis damaĝita de afidoj. Mankis al mi sperto pri ekstermado de tiu finsekto, mi do min turnis al la popolamasoj por lerni de ili kaj eksperimenti kune kun ili. Veteranaj terkulturistoj diris al mi, ke estas du specoj de afidoj, nome la sekamantaj kaj la akvamantaj, kaj la tritikradikaj afidoj estas sekamantaj, do akvotimantaj. Sekve ni aplikis samtempe insektomortigilon kaj akvumadon kaj baldaŭ ekstermis ilin. Alian fojon, la brigado faris eksperimenton pri kulturado de rizplantidoj sub la kovro de plasta membrano. Komence, mi proponis fari bedegojn, sed tio estis neebla pro la sablozo de la tiea grundo. Fine, la popolamaso elpensis taŭgan metodon por fiksi la membranon, nome enterigi ĝiajn randojn, kaj tiel solvis la problemon. En la lastaj jaroj, Jinhi-brigado faris serion da teknikaj reformoj. Kaj ĉiuj malfaciloj renkontitaj en ili estis solvitaj dank' al la kolektiva saĝo de la popolamasoj.

Tra la produkta praktikado mi ekkomprenis, ke estas neeble ĝisfunde solvi lokajn komplikajn problemojn en produktado, se oni ne humile lernadas de la popolamasoj kaj laboradas kune kun ili. La sciencaj laborantoj de agronomio nepre devas labori kiel ordinara terkulturisto, praktikadi, produktadi kaj kunligi kun la popolamasoj por atingi kontentigajn sukcesojn en scienca esplorado, alie sukceson ili ne povas multe akiri.

OKULFRAPAJ ŜANĜOJ EN JINHI

Antaŭ 1956, Jinhi-brigado ne povis produkti sufiĉan grenon por kontentigi siajn bezonojn, sed nun ĝi jam havas superfluan grenon. Lastjare, ĝi vendis 1,600,000 ĝinojn (800 tunojn) da greno al la ŝtato. En la lastaj jaroj, ĝi konstruis pli ol 200 loĝejojn kaj du elementajn lernejojn kaj fondis siajn malgrandan fabrikan, hospitalon kaj klubon. La plejparto de la membroj nun havas ŝparmonon en banko kaj instaligis elektrajn lampojn al siaj hejmoj. Prospero de socialisma kamparo. La grandaj ŝanĝoj de Jinhi estas rezultato akirita dank' al persistado en la tri gran-

daj revoluciaj movadoj de klasbatalo, produktobatalo kaj scienca eksperimentado sub la gvido de la Partio. Rilate al la movado de scienca eksperimentado, sep specialaj grupoj estas stariĝitaj por studo kaj disvastigo de novaj teknikoj en kombino kun la produktado dum la ok pasintaj jaroj por solvi la problemon ke en Jinhi estas multe da loĝantoj, malmulte da tero, malalta po-hektara produktokvanto pro la malfekundeco de la grundo kaj oftega trosekeco. Tiuj grupoj resumis, provis, demonstris kaj disvastigis pli ol kvarcent agrikulturajn teknikojn kune kun la popolamasoj, kaj ŝanĝis 98 procentojn de la agroj de la brigado en sekure altproduktajn aŭ modelajn kampojn.

Aliaj gravaj teknikaj reformoj estas plivastigo de la areo de kampoj, sur kiuj oni povas kreskigi agropilantojn pli ol unufoje en ĉiu jaro, la adopto de durikolta sistemo anstataŭ unurikolta, la adopto de tririkolta sistemo anstataŭ durikolta sistemo kaj disvolvo de la sistemo de intermiksa semado de pluraj agropilantoj. Kaj krome, oni atingis rimarkindajn sukcesojn ankaŭ en pligrandigo de kulturado de legumenacoj, efektivigo de alterna kulturado de akva- kaj seka-kampaj plantoj sur sama parcelo, kulturado de sukerkanoj sur montodeklivoj, disvastigo de bonaj plantvarioj, plimultigo de novaj sterkofontoj, preventado kaj ekstermado de plantmalsanoj kaj finsektoj kaj plibonigo de kulturaj teknikoj.

Laborante en produktado ŝultron ĉe ŝultro kun la popolamasoj de Jinhi, mi akiris profundan intimecon kun ili. Mi ekamis la montojn kaj akvon de la loko, kaj ankoraŭ pli multe ĝiajn simplajn, honestajn, bravajn kaj laboremajn popolanojn. Unuvorte, mi enamiĝis al ĉio de Jinhi, kaj mi decidis laboradi en la Jinhi-brigado, sur ĝiaj modelaj kampoj dum mia tuta vivo.

**Klasecoj difinitaj dum la agrara reformo.*

AFRIKAJ PROVERBOJ

- * Kiu volas melki leoninon, tiu devas venki sian timon.
- * Kaptinte l' kapon de serpento, ĝin firme tenu kun prudento.
- * Se lupo en ŝafejon ŝovas sian kapon, ĝi ne restigos ekstere la korpon.
- * En ŝnuron torditaj fadenoj ja povas eĉ ligi leonon.

Li Giefu —*Revolucia* *Komponisto*

DUM sia tridekjara kreado, Li Giefu, fama nuntempa revolucia komponisto de Ĉinio, la direktoro de la Ŝenjang-a Konservatorio en nordorienta Ĉinio, verkis multajn revoluciajn kantojn nacistilajn, kiuj bone spegulas la aktualan luktheadon kaj ĝuas grandan popularacon inter la popolamasoj. Dum la lastaj jaroj, tre vaste kantataj tra tuta Ĉinio estas la kantoj de li komponitaj, kiel ekzemple la poemoj de Prezidanto Maŭ *La Umea Floro* kaj *Laŭ la Skemo de Die Lian Hua* (Responde al Li Ŝuji), por kiuj li verkis melodiojn, kaj la kantoj verkitaj de li *Marŝas Ni sur Granda Voj**, *Knabo de Havano* k. a., kiuj prezentas la viklecon kaj bravecon de la ĉina

popolo en konstruado de sia patrolando aŭ subtenas la revolucion luktheadon de la popoloj en Azio, Afriko kaj Latinameriko.

Li Giefu naskiĝis en kamparana familio en Liaŭning-provinco, nordorienta Ĉinio. Li ekŝatis kanti kaj ludi popolajn muzikilojn en sia juneco. En 1931, kiam la japanaj imperiistoj invadis nordorientan Ĉinion, li estis ankoraŭ mezlernejano. Li fuĝis al norda Ĉinio kaj baldaŭ partoprenis revolucion agadon. Sub la gvidado kaj edukado de la kompartio, rapide altiĝis lia politika konscio, kaj li ekvidis, ke por bone servi la revolucion per siaj fortoj, li nepre devas profundiĝi en la popolamasojn

Li Giefu provkantas sian verkon.



de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj lernadi de ili por havigi al si iliajn penson kaj sentojn.

En la jaroj de la revolucia milito, Li Giefu profundigis en la fronton, batalis ŝultron ĉe ŝultro kun la soldatoj, kaj profitante intervalojn en batalado li entreprenis verkadon kaj organizis la batalantojn kaj kamparanojn kanti kaj fari aliajn kulturajn aktivadojn. Dank' al sia longtempa kunvivado kaj kunbatalado kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, liaj verkoj forte impresas per etoso de revolucia batalado kaj nacieca koloro. Ĝuste pro tio, la kantoj de li komponitaj ne nur ĝuas ŝaton de la vastaj laborantaj popolamasoj, sed ankaŭ kuraĝigas ilin heroe batali.

Mi rakontu ĉi tie historion neniam forgesblan dum mia tuta vivo:

Tio okazis ne longe post la Kontraŭjapana Rezistmilito, kiam mi laboris en drama trupo en la Milita Regiono de la tiama Ĵehe-provinco. Laŭ la bezono de la batalado, nia teatra trupo eniris la "senhoman regionon" en la suda parto de tiu provinco por labori tie. Tiu regiono estis kreita de la japanaj invadantoj por malebligi kontaktadon de nia armeo kun la popolo de nord-orienta Ĉinio. La kruelaj agresantoj praktikis tie la politikon "forbruligi ĉiujn domojn, forrabi ĉiajn valoraĵojn kaj mortigi ĉiujn homojn". Tamen, sub la gvidado de la Komunista Partio de Ĉinio, la tieaj popolanoj persistis en sia batalado.

Kiam ni eniris la "senhoman regionon", vere tragika bildo de mizero nin kortuŝis: ĉiuj familioj loĝis en preskaŭ-ruinaĵoj, la homoj surhavis nur ĉifonojn kaj iuj estis preskaŭ tute nudaj, kaj multaj el ili portas funebnan blankan rubandon sur la hararo aŭ ĉirkaŭ la brako por siaj mortintaj familianoj.

Iun vesperon, mi kaj kelkaj aliaj kamaradoj tranoktis kun lokaj vilaĝanoj nin kunpremante en malgranda kabano kun terure difektita tegmento, kiu lasis vidi la ĉielon. En nebula lunlumo, iu vilaĝa kadro rakontis al ni pri sia batalado kontraŭ la malamikoj: Foje li estis arestita. La malamikoj lin torturis trifoje per "tigra stango" kaj sesfoje verŝis kapsikan sukun en liajn naztruojn. Li svenis plurfoje, sed neniun vorton li ellasis pri siaj sekretoj. Lia historio nin kortuŝis, kaj ni, kiel kutime faras la literaturaj kaj artaj laborantoj, tuj demandis lin, kia forto tiam lin subtenis. Li respondis senurĝe, ke lin helpis du kantoj.

"Kio? Du kantoj?" Kiel muzika laboranto, kompreneble, mi precipe interesiĝis pri la respondo.

"Jes, ĝuste du kantoj!" li rediris trankvile.

"Kiaj do?"

"Tute ordinaraj, kiujn scipovas kanti ĉiuj ĉe nia loko. Unu el ili estas *Kanto pri Bovpaŝtisto Erhiaŭ*, la alia...."

Parolante li ekbruligis pinlumigilon, kiu tuj hele lumigis la malgrandan kabanon kaj briligis la vizaĝon de la junaj kaj maljunaj kamparanoj. Videble, ili ĉiuj kun seriozaj kaj meditaj okuloj dronis en la memoro pri la tagoj de kruela luktado. Tiam la vilaĝa kadro diris: "Unu, du!" kaj la silento de profunda nokto en la montaro tuj rompiĝis de kantsonoro:

*Vi petas, ke mi kantu,
Aŭskultu kanton pri hero' nacia Vang Ho....*

Mi rimarkis, ke larmoj brilis en la okuloj de pluraj kamparanoj, kiam ili kantis la versojn:

*La malamikoj brogis lin per bola akvo.
Fortranĉis de li la orelojn,
Por ke li diru la sekretojn.
Kun brust' elstara, li ne diris eĉ vorteton.*

Tamen ili daŭrigis la kantadon kun pli laŭta voĉo:

*Eĉ en la tag' de ekzekuto,
Nia heroo ne paliĝis,
La karajn Kompartion kaj patrion
Kun kora am' li adiaŭis.*

Ho, mi ne povas trovi taŭgajn vortojn por diri al vi miajn sentojn en tiu momento! Mi sentis, kvazaŭ ĉiu el la kantantaj kamparanoj antaŭ miaj okuloj estus Vang Ho, ke la kanto estus verkita de Vang Ho mem! Mi sentis, kvazaŭ ankaŭ mi suferus kune kun Vang Ho la torturadon kaj ekzekuton!....

Tio okazis antaŭ dudek jaroj, tamen mi neniam povas ĝin forgesi. La kortuŝa *Kanto pri Vang Ho* estis verkita ĝuste de kamarado Li Giefu kune kun iu alia kamarado. Tiel kortuŝe la kantoj verkitaj de li kuraĝigas la popolon bataladi kaj marŝi antaŭen....

Post la Liberiĝo, li laboris kiel direktoro de la Ŝenjang-a Konservatorio. Sed oni ankoraŭ tre ofte vidas, ke li partoprenas fizikajn laborojn en terkulturado, konstruado de irigaciaj kanaloj k. a. kune kun la instruistoj kaj gestudentoj de la konservatorio same kiel la ordinaraj kamparanoj kaj aranĝas koncertojn por ili. En 1960, Li Giefu iris al la unua ŝtalprodukta bazo de Ĉinio — la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio, kaj laboradis kaj vivis tie kune kun la laboristoj. Tie li vidis proprakule la noblan penson de la ŝtalproduktantoj strebi al prosperiĝo per penlaborado laŭ la principo sin apogi sur siaj propraj fortoj, kaj ilian batalspiriton timi nenian malfacilon kaj kuraĝi por lukti kaj kreadi. Dum la tagoj, kiam li manĝis, vivis kaj laboris kune kun la laboristoj, multaj novaj specoj de ŝtalaĵoj produktiĝis unuj post aliaj. Li sentis, pro tio, ĝojon kaj fieron. La muzikaj figuroj de la kanto *Marŝas Ni sur Granda Voj'* emergis en lia cerbo ĝuste en tia cirkonstanco.

Profundiĝi en la vivon kaj batalojn kaj verki kantojn bone spegulantajn la realon, jen estas la okulfrapa karakterizaĵo de la komponista kreado de Li Giefu. En la kantoj de li komponitaj speguliĝas multaj akraj bataloj kaj gravaj eventoj okazintaj ĉu enlande aŭ eksterlande, ĉu en la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, aŭ en la periodo de la Liberiga Milito, aŭ en la periodo de la socialisma revolucio kaj la socialisma konstruado. Ekzemple, per siaj kantoj *La Kvin Herooj sur la Monto Langja*, *Marŝo Kontraŭfaŝisma*, *Bonas la Popolkomunumo*, *La Negra Knabino* li prikantas, kun plej alta politika patoso, la heroajn kaj kreivan laboron de la popolo, kaj la heroan spiriton de la popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko, kiuj ekprenis armilojn por decideme batali kontraŭ imperiismo.

La kantoj de Li Giefu notis la batalojn kaj venkojn de la ĉina popolo, prezentis ĝian noblan internaciismon kaj ankaŭ senĉese ĝin instigas al entuziasma strebado en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. Jen kial liaj kantoj ĝuas ŝaton kaj popularecon inter la ĉinaj popolamasoj.

Marŝas Ni sur Granda Voĵ'

Vortoj kaj muziko de Gieĉu
Esperantigis Laŭlum

Marŝe

1 Mar- ŝas ni sur gran- da voĵ', Brav- a-
ni- me kaj kun ba- tal- ĝoj'. Maŭ Ze- dong gvi- das nin en la
fron- to, Mar- ŝas ni tra l' dor- noj kaj vent- boj' Al la
front'! Al la front'! Re- vo- lu- ci- o fla- mas tra la
mond' Al la front'! Al la front'! Al la
ven- ko en la es- tont'! 2. La tri ven- ko en la es- tont'!

Marŝas ni sur granda voĵ',
Bravanime kaj kun batalĝoj'.
Maŭ Zedong gvidas nin en la fronto,
Marŝas ni tra l' dornoj kaj ventboj'.

Refreno:

Al la front'! Al la front'!
Revolucio flamas tra la mond'.
Al la front'! Al la front'!
Al la venko en la estont'!

* * *

La tri flagoj flirtas en vent'.
Nia sescentmiliono gent',
Per la manoj kaj cerboj penas
Por konstru' de nia tereden'.

(Refreno)

* * *

Tra la mondo — nia amikrond',
Tra la tero — nia kanta son'.
Muĝas revolucia ciklono,
Tremas ĉiu vulpo kaj demon'.

(Refreno)

* * *

Nia vojo larĝas en la front',
Kaj brilegas nia la estont'.
Strebas ni por pli bela mondo
Kun glorsento kaj kun volont'.

(Refreno)

— Fino —

LA NOVA FIZIONOMIO DE LA AGRIKULTURO SUR LA MONDA TEGMENTO



*Kiu estas pli granda? la
brasiko aŭ la tibeta etulino?*

Tomato kaj aliaj varm-amaj plantoj nun estas kreskigataj sur vasta areo en Tibeto.





Tibetaj kapolaboristoj sarkas por la et-radikaj ĉinaj brasikoj enkondukitaj el Ljuda en nordorienta Ĉinio.

VENKO DE VERA SCIENCO

En la pasinteco, iuj agronomiaj specialistoj asertis, ke en regiono proksima al la “neĝa linio” de 3500 ĝis 4000 metrojn super la marnivelo, povas kreski nur malmultaj agroplandaĵoj kiaj pizo, hordeo, terpomo kaj kelkaj radiko-legomoj, kiuj povas elteni froston kaj malfekundecon.

Tiu ĉi aserto jam estas rompita de la ĉinaj agronomoj kaj kampuloj de la Tibeta Regiono en produkta praktikado.

La agrikulturaj regionoj de la Tibeta Altebenajo estas meznombro pli ol 3000 metrojn super la marnivelo. Sed la agronomoj kaj kampuloj en Tibeto ne blinde kredis la aserton, ke en tiu regiono nur malmultaj agroplandaĵoj povas kreski. Dank’ al sia produkta praktikado kun scienca sinteno, ili ekkonis, ke en tiu regiono kvankam troviĝas la malfavoraj kondiĉoj de frostego, malsufiĉa pluvo, longa prujno-periodo, sekeco de la aero k. s., tamen tie la longa sunbrilado, forta radia varmo kaj la granda diferenco inter la taga kaj nokta temperaturoj utilas al la kreskado, maturiĝo kaj nutraj-akumulado de agroplandaĵoj.

Aktive utiligante la favorajn kondiĉojn de la naturo, la agronomoj kaj kampuloj en Tibeto prove kulturis ekde 1960 ĝis nun, unujn post aliaj, pli ol 5000 speciojn de plantaĵoj inkluzive de

grenplantoj, legomoj, fibroplantoj, sukerplantoj, batato, fruktaroj k. a., kiuj estas konvenaj por kreskigo sur altebenajo. Post eksperimentado kaj ekzemplodonado, iuj bonaj specioj jam estas disvastigitaj tra la tibeta kamparo, tiel ke en la frostega regiono sur la monda tegmento aperis nova prospera fizionomio de konkura kreskado de multaj agroplandaĵoj.

KE TIBETO PRODUKTU LEGOMOJN KAJ FRUKTOJN

En la pasinteco, sub la regado de la reakciaj feŭdaj servutulaj mastroj, la tibetaj laboruloj tute ne povis akiri legomojn. Tiam, la legomoj kiaj tomato, kukumo, kapsiko k. s. estis raraĵoj troveblaj nur ĉe luksaj festenoj de nobeloj kaj servutulaj mastroj. Kaj tiuj malmultaj legomoj estis importitaj el fremdlandoj kaj alportitaj surdorse de homoj kaj bovoj!

En la pasintaj pli ol ses jaroj, nemalmultaj specioj de legomoj de la interna landparto jam estis enkondukitaj en Tibeton, kaj dank’ al zorgema kulturado ili finfine al kutimiĝis al la nova hejmo en la frostega regiono kaj sane kreskas tie. Ĉu en malvarmega vintro aŭ agrable malvarmeta sezono, oni povas vidi, sur kampoj kaj en varmdomoj preskaŭ en la tuta regiono de orienta Tibeto, freŝverdajn legomojn prospere kreskantaj.



Bonspeciaj pomarboj el Pekino kaj nordorienta Ĉinio.

En la foiroj de Lhasa, Ŝjegaze, Ĉangdu k. a. ĉefaj urboj de Tibeto, nun estas ĉiam aĉetebraj ruĝaj tomatoj, helverdaj kukumoj kaj famaj brasikoj el Ŝandong-provinco. Krome, oni povas laŭplaĉe havigi al si lentojn, ajlojn, laktukojn k. s. abunde vendatajn ĉe la legom-standoj. La kvanto de la legomoj ĉiutage vendataj en Lhasa estas dekkelkoble pli granda ol tiu de 1959.

Kaj nun ankaŭ sur la manĝotablo de ordinaraĵ tibetaj kamparanoj ofte troviĝas la raraj legomoj, kiujn povis ĝui nur la feŭdaj servutulaj mastroj ĉe luksa festeno.

Post plurjara klopodo en enkonduko, provplantado kaj plibonigo de la kultura tekniko, iuj bonaj specioj de fruktaroj konvenaj por kulturado en Tibeto nun estas disvastigataj en certaj regionoj de Tibeto. En Lhasa, Ŝjegaze, Ĉangdu k. a. jam stariĝis grandaj fruktoĝardenoj, en kiuj arboj de pomo, piro, persiko el la interna landparto jam komencis doni fruktojn. Precipe la arboj de Guoguang-pomo, banan-pomo kaj ŝanhaja mielsuka persiko ne nur bone kreskas sed ankaŭ konservas la bonajn kvalitojn de la originaj fruktaroj.

KULTURO DE NOVAJ AGROPLANTOJ PER NOVA METODO

En la pasinteco, la agrikultura produkto de Tibeto estis postĝinta. La reakciaj feŭdaj servutulaj posedantoj sciis nur kruele subpremi kaj ekspluati la servutulojn kaj tute ignoris pri plibonigo de agrikultura tekniko. La plejparto

de la agroj de Tibeto estis tre malmulte sterkitaj, kaj iuj eĉ tute ne sterkitaj.

En 1959, post la demokratia reformo, la kamparanoj fariĝis mastroj de tero. Ili energie volas ŝanĝi la postĝintecojn de la ticia agrikultura produkto. Dum la pasintaj ses jaroj, la kultura tekniko estis plibonigata en granda amplekso kaj dank' al tio la produktokvanto de greno plialtiĝis senĉese. En la pasinteco, nur en iuj lokoj de Tibeto printempa tritiko estis kulturata kaj la po-mua produktokvanto estis nur ĉirkaŭ 75 kilogramoj. Nun la vintra tritiko enkondukita de la Tibeta Agronomia Instituto jam estas sukcese provkulturita en multaj lokoj kaj ekdisvastigata. La po-mua produktokvanto de la bonkvalita specio de vintra tritiko — grasa tritiko — kulturita de la Eksperimenta Agrikulturejo de la Tibeta Agronomia Instituto, dum pluraj jaroj, superis 250 kilogramojn, kaj tiu de tia tritiko kulturata sur ordinaraĵ kampoj superis 150 kilogramojn. Krome, la dirita instituto kulturis kaj enkondukis ankaŭ aliajn speciojn de bonaj agropiantoj. Post provkulturado kaj disvastigo ili montriĝis pli multe produktaj kaj estas tre bonvenigataj de la vasta kamparano.

Kvankam Tibeto estas regiono frostega kaj malfekunda, tamen dank' al la laborado de la agronomoj kaj kamparanoj la postĝinteco de ĝia agrikulturo estas iom post iom ŝanĝiĝanta kaj ĝi fariĝos nova regiono abunda de legomoj, fruktoj, grenoj k. s.

Nova Tibeto post la Demokratia Reformo

Gaja festo de abunda rikolto.

Foto de He Ŝijaŭ





La Lhasa-a Cement-fabriko.



La Lhasa-a Pontego



Foto de Gin Ĉijuan

Provplantedo de vintra tritilo
en la lastaj sinsekvaj jaroj.




Foto de Gin Ĉijuan kaj Ĉen Gjun




Tibeta teknikisto eksperimentas en la Lhasa-a Fabriko de Biologiaj Sanigiloj.
Foto de Gin Ĉijuan



akcesis en Tibeto kaj oni akiris riĉan rikolton
Foto de Ĵu Sujĉu





Veterinara alvenis por senpagaj prevento kaj kuraco al bestoj
de paŝtistoj.
Foto de Ĵu Sujĉu



Novaj gastoj sur la altebena — grandaj anseroj el Vuhi, Giangsu-provinco. Foto de Ĵu Sujĉu

Ĉevalkonkurso, iam profitodona por reakciaj regantoj en Tibeto, nun fariĝis gaja festo por paŝtistoj. Foto de Ĵu Sujĉu





“BARI MARON KAJ TRABORI MONTON POR RIĈA RIKOLTO”

Ĉi tiu titolo rememorigus niajn legantojn pri la artikolo kiun ni aperigis en la 4-a numero de EPĈ. Oni informis en ĝi pri la heroa transformado de la naturo fare de la Marborda Brigado de la Hajmen-a Popola Komunumo en Ĝegiang-provinco. Jen estas bildaro spegulanta la aferon.




Supre maldekstre: Partisekretario Kiu Pufa (la unua de maldekstre) ĉiam laboras surkampe kune kun la aliaj komunumanoj. La foto montras, ke li studas teknikon de insektomortigado kaj branĉoselektado de kotonarboj kun brigadaroj.

Supre dekstre: La Marborda Brigado kun impetega entuziasmo konstruis digon pli ol 1100 metrojn longan, kiu protektas la vastan kotonkamparon kontraŭ martajdo kaj superakvo.

Sube dekstre: Kamparo kiu antaŭe donis nur unu rikolton por ĉiu jaro donas du rikoltojn de rizo. La bildo montras, ke komunumanoj disŝprucigas insektomortigilon.

Sube maldekstre: La Marborda Brigado kun la revolucia spirito de sinapogo sur siaj propraj fortoj kaj obstina luktado kontraŭ malfaciloj traboris la monton Tengjun kaj fosis kanaleton 142 metrojn longan kaj 2 metrojn altan akvokondukan tunelon.



Malsamaj Tagoj ĉe la Klara

FOTO PRI LA MIZERA PASINTECO

Geomikoj, vidu la foton malsupre sur p. 260. Ĝi estas atesto pri la mizera pasinteco de Ĉinio, miniaturo de la suferplena vivo de la kamparanoj de la malnova Ĉinio.

Ĝi estis farita en junio de 1949 ĉe Kingju-vilaĝo de Nan-gubernio, Hunan-provinco. Tiutempe granda parto de la ĉeftero de Ĉinio jam liberiĝis, sed Hunan-provinco ankoraŭ ne. Ĝuste tiam la ĉirkaŭaĵo de la Klara Lago estis serioze inundita. La vilaĝa estraro de la kuomintanga reakciularo, kiu jam baraktis en agonio, anstataŭ klopodi savi la suferantajn popolanojn, brute pelis ilin en profundan akvon kaj fariĝis tiun ĉi foton por sin riĉigi per ŝtata mono en preteksto savi la suferantojn. La fiuloj ja ne atendis, ke ĝi fariĝis hodiaŭ atestilo pri ilia krimo.

HIERAŬ KAJ HODIAŬ ĈE LA KLARA LAGO

Antaŭ la Liberiĝo, la kamparanoj ĉe la Klara Lago vivis tre mizere, ĉar la multspecaj, pezegaj impostoj fiksitaj de la kuomintanga reakciularo kaj la pezaj ter-lupago kaj uzuro senigis al ili la vivrimedojn. Tiam la Klara Lago ofte inundis. Laŭ statistiko pri pli ol

dudek jaroj sub la regado de Kuomintango, el la 30 familioj tie loĝantaj, 7 devis forlasi sian hejmon por serĉi vivpanon, 7 sin vivtenis per almozado kaj 22 homoj laboris por bienuloj kiel jardungitoj por vivteni siajn familianojn.


Antaŭ la Liberiĝo, inter la tieaj kamparanoj cirkulis la jena popolkanto:

*Mallumo sur la Klara Lago,
En ĉies vivo mizer-plago:
Por trink' — la akvo kun herbtigoj,
Por manĝo — la fragmit-radikoj,
Por loĝ' — akvokarceraj nestoj,
Por korpo — nur ĉifonaj vestoj.*

Tiu ĉi kanto fidele bildigis la mizeran vivon de la tieaj kamparanoj en la malnova Ĉinio.

Hodiaŭ, ĉe la lago jam okazis radikalaj ŝanĝoj. Post la liberiĝo de la loko en aŭgusto de 1949, la Partio kaj la Popola Registaro donis grandan sumon da mono kaj gigantan kvanton da greno por savi la suferantojn de inunda katastrofo kaj gvidis la popolamason konduki produktadon kaj elimini katastrofon kaj helpis la kamparanojn rekonstrui siajn hejmojn. En 1950, la tieaj kamparanoj efektivigis, sub la gvido de la Partio, agraran reformon, faligis la bienulojn kaj lokajn tiranojn kaj marŝis sur la vojon de feliĉiga kolektivigo. Dank' al kolektiva penlaborado dum pluraj vintroj kaj printempoj, finfine ili sukcesis konstrui lagodigon kun longeco de pli ol 2000 metroj kaj bone jungis la inundeman Klaran Lagon. Sekve de la fondiĝo de la popola komunumo, la agrikultura produkto ĉe la lago akiris plian disvolviĝon. Sub la helpo de la popola komunumo, la tieaj kamparanoj konstruis irigaciajn kanalojn, kluzporojn, instalas elektrajn pumpmaŝinojn kaj ŝanĝis la malmulteproduktajn kampojn en la ĉirkaŭaĵo de la lago en konstante altproduktajn kampojn kiujn povas minaci nek sekego nek inundo. La produktokvanto de greno pligrandigis ĉiujare. Ili kreskigis krome lotusojn k. a. profitodonajn plantojn en la lago kaj bredis fiŝojn en akvo apud la bordo. La malriĉa ĉirkaŭaĵo

Dren-irigacia ekipaĵo kiu certigas abundan rikolton.



Lago

de la lago fariĝis distrikto abunda je rizo kaj fiŝoj.

Sekve de la senĉesa disvolviĝo de la produkto, ankaŭ la vivo de la loĝantoj ĉe la Klara Lago pliboniĝis. Ĉiuj familioj ĝuas abundon de manĝaĵoj kaj vestoj kaj estas kontentaj pri la feliĉa vivo. Vicoj da novaj domoj anstataŭis la malnovajn kadukajn kabanon en la vilaĝo kaj nove fonditaj elementa kaj postlabora lernejoj klerigas la infanojn kaj plenaĝulojn. Se la komunumanoj bezonas ian komercaĵon, ili povas tion havigi al si helpe de la Konsuma Kooperativo kaj ne plu bezonas mem iri malproksimen. En festotagoj, la klubo de la vilaĝo kutimas aranĝi kolektivajn amuzojn kiaj dancado, kantado, muzikado por doni buntan atmosferon de ĝojo. Oni povas diri, ke la hodiaŭa ĉirkaŭaĵo de la Klara Lago diferencas de la hieraŭa kiel la Edeno de la Infero.

LA NUNA FELIĈA VIVO

La mizeruloj sur la foto farita antaŭ la Liberiĝo nun jam fariĝis mastroj de la nova Ĉinio kaj vivas tute malsaman vivon.

El la 22 fotitoj, escepte de 4 personoj, kiuj perdis sian vivon pro malsano kaj malsato en la malnova socio, ĉiuj nun vivas en feliĉo. Tri el ili fariĝis reprezentantoj de la popola komunumo, aliaj kvin fariĝis ĝiaj funkciuloj, kaj la ceteraj iĝis teknikistoj kaj elstaraj komunumanoj.

La mezaĝa virino kun infano en la brakoj en la unua vico (la dua de dekstre) aspektas malespera pro la mizeroj kiujn la katastrofo alportis al ŝi. Ŝia edzo Vang Hanking tiam laboris kiel jardungito ĉe bienulo. La sep membroj de ŝia familio vivis en tre malgranda kaduka kabano, kaj havis nur unu ĉifonan vatitan litkovrilon kaj eluzitan liton por nokta ripozo. Por sin savi de malsatmorto, ŝi devis migri de loko al loko por almozpeti kun sia infano. Post la Liberiĝo, ili jam havas kvar vastajn ĉambrojn, novajn vatitajn litkovrilon, pli ol 70 kompletojn da vestoj por



Sur la nuna bordo de la Klara Lago.

vintro kaj somero, diversajn meblojn k. a. vivbezonaĵojn. Ĝiaj tri filoj jam edziĝis kaj la tuta familio kondukas vivon ĉiam pli prosperan.

La unua (de maldekstre) en la unua vico de homoj en la foto nomiĝas Li Juehian. Antaŭ la Liberiĝo li laboris kiel jardungito ĉe bienulo kaj apenaŭ povis vivteni siajn edzinon kaj fileton. Longtempa kaj pezege laborado premis lin en suferadon de ftizo. Lia edzino Hu Sanjuan suferadis de virinaj malsanoj kaj ne naskis infanon dum multaj jaroj pro manko de mono por kuraci ŝiajn malsanojn. Post la Liberiĝo, sub la prizorgo de la Partio kaj la popolo, iliaj malsanoj estis kuracitaj. En 1956, 13 jarojn post la naskiĝo de la

ANTAŬE ALMOZULETOJ — NUN DAŬRIGANTOJ DE LA REVOLUCIO

Post la Liberiĝo, la infanoj vidataj en la foto plenkreskiĝis sub la flegado de la Partio kaj iĝis fidindaj daŭrigantoj de la socialisma konstruado. Iuj el ili fariĝis batalantoj en la Popola Liberiga Armeo, aliaj fariĝis gvidantoj de produktaj brigadoj kaj ankoraŭ iuj membriĝis al la Komunisma Junulara Ligo.

Vidu la vigran junulon en la maldekstra foto. Ĉu vi povas kredi, ke li estas la nuda knabo en la malantaŭa vico (la dua de dekstre) de la malnova foto? Li nomiĝas Ĝoŭ Gigie. Antaŭ la Liberiĝo li estis orfo tute senhelpa. Lia patro mortis baldaŭ post lia naskiĝo pro subpremado de bienulo, kaj pro la sama kaŭzo lia patrino devis reedziniĝi nelonge poste. Je la Liberiĝo li estis nur 8-jara kaj la Partio prenis lin sub sian zorgon. Sub ĝia amema flegado, Ĝoŭ Gigie rapide kreskis kiel forta plantido. Nun li estas elektita de la komunumanoj kiel kadro de produkta brigado. Li ofte diras: “Mi plenkreskiĝis dank’ al flegado de la Partio kaj la klasaj fratoj. La Partio estas miaj gepatroj kaj la kolektivo, mia familio.”

La unua knabo (de dekstre) en la malantaŭa vico sub la tegmento en la foto nomiĝas Ĝoŭ Joŭcaj. Antaŭ la Liberiĝo, li almozadis kun sia patrino migrante tien kaj tien kaj suferis de oftaj maljustaj insultoj kaj batoj. Nun li fariĝis milica plotonestro direktanta la ekzercedon kaj lernadon de la milicanoj por defendi la feliĉan vivon de la kolektivo.

Karaj geamikoj, en la fama moderna ĉina opero “Blankhara Knabino” estas du trafaj versoj, kiuj same bone priskribas la pasintecon kaj nuntempon de la kamparanoj en la ĉirkaŭaĵo de la Klara Lago:

*La soci’ malnova fantomigis homojn;
La socio nova rehomigas la fantomojn.*

unua infano, la geedzoj ricevis alian infaneton. En 1959, la pliaĝa filo edziĝis kaj havigis al ili du nepojn. Nun Li Juehiang laboras kiel estro de produkta brigado kaj ankaŭ liaj filo kaj bofilino bone laboras en la sama brigado. La sep-membra familio kondukas vivon feliĉan.

Ĝoŭ Gigie.

*Post la inundo okazinta
antaŭ 17 jaroj.*



Ne necesas demandi al murmuraj kamel-
sonoriloj,
Nek al la vipoj de l' veturigistaj viroj:
En la pasinto flava vento skuis la
gastejon,
Kaj la kadukan ĉirkaŭmuron kun velk-
herbaj miloj.

Alvenis gastoj pro l' alvok' de ĝia
anonc-flago,
Sed sur-terlite ili sidis ĝis malfrua
noktohorro,
Kun longaj ĝemoj en la fumo de tabako.
Sur la vastega norda stepo: tristo kaj
doloro.

Alvenas mi tranokti ĉi vespere,
Vizaĝoj ridas en la ĉaro kaj ekstere.
Antaŭ l' fenestroj, en sunbrilo, floroj
belas,
Tuj mia laco tute malaperas.

Sur lit', en varmaj feloj, lan-kovriloj,
Ni distras nin per gajbabiloj:
"Al kie, kamarado?" "Suden, por laboro
— Konstrui ponton. Kaj vi?" "Al nordo,
por esploro."

"Hahaha, ĉu ni gastas?
Kun tiel multaj ĉaroj, homoj kaj hotelo
La norda stepo nun malvastas....."
"Jes ja, vojaĝo nia — nur hejma pro-
menoj."

Denove ridoj flugas el la domo,
Kaj ĉaro en la korton venas de l' ŝoseo.
"He, kamarado, kio estas la ĉi-loka
nomo?"
"Antaŭe Ventblovejo, sed nun Flor-
gastejo."

TRAD. LAŬLUM

* KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ *



NOVTIPA ULTRASONA DIKEC- MEZURILO

La novtipa ultrasona dikec-mezurilo farita de ĉinaj inĝenieroj estas nun pogranda fabrikata de la Ŝanhaja Ĝong-juan-a Fabriko de Elektroj Aparatoj.

Tiu mezurilo kun grandeco de ordinara alumina manĝo-skatolo kaj pezo de 1.6 kilogramoj, provizita per mallonga elektra drato, estas uzata por precize mezuri la dikecon de lado, tubo, kaldrono, altprema ujo k. a. el metalo post la korodiĝo dum uzado, tiel ke oni povu ŝanĝi

aŭ ripari ilin se necese. Ĝi estas tre utila por ŝipkonstrua, aviada, petrola, kemia kaj aliaj industrioj.

EKIPAĜO POR SAMTEMPA INTERPRETADO

Estas instalita lastatempe en Ĉinio la unua ekipaĝo de 8-lingva samtempa interpretado. Ĝi povas elsendi samtempe 8 malsamajn lingvojn. Ĉiu el ili komunikiĝas samtempe kun 500 aŭskultiloj. Tiu ĉi ekipaĝo konsistas el 100,000 partoj, kiuj ĉiuj estas produktitaj de Ĉinio mem.

24-EKSPONENTA ELEKTRONA ANALOGA KOMPUTMAŜINO

La Tiangin-a Fabriko de Elektroj Instrumentoj sukcesis provfari 24-eksponentan elektronan ana-

logan komputmaŝinon de meza tipo. Tiu ĉi kalkulmaŝino estas de tipo multŝranka kaj konsistas el kalkulaj partoj por adicio, multipliko, kvadrato, funkciofaro, kaj koefficientoŝanĝo. Ĝi povas fari kalkuladon pri 24-eksponentaj liniaj kaj neliniaj diferencialaj ekvacioj.

MALGRANDA TRANSISTORA DIKTAFONO

La Ŝanhaja Fabriko de Sonregistraj Aparatoj kaj Materialoj lastatempe sukcesis provfari malgrandan transistoran diktafonon el enlande produktita materialo. La aparato estas 200 mm. longa, 185 mm. larĝa, 65 mm. alta kaj 1.7 kilogramojn peza. La volvaĝo de ĝia magneta sonbendo estas iom pli granda ol la aperturo de taso. La bendo sufiĉas dutrake kune por uzo de unu horo kaj dudek minutoj.

VERA HEROO MIN EDUKIS

LI JINGGIE

AKTORO DE LA MEJHU-OPERA TRUPO
DE LINJI-GUBERNIO, ŜANJI-PROVINCO



Hju la Tria, modela bredisto, kiu tutkore amas sian komunumon kaj defendas la kolektivon intereson. (Rolo ludata de la verkinto)

EN la pasinteco mi ludis nur rolojn de negativa tipo kaj tial la roluloj de pozitiva tipo estis tre fremdaj al mi. Lastatempe, por ludi la operon “Unu Ruĝa Koro”, mi estis asignita por ludi la rolon de Hju la Tria, bredisto, kiu tutkore amas la kolektivon. Tio min tre maltrankviligis. Mi timis, ke se eventuale mi malsukcesos en la prezentado, tiam makuliĝos mia prestiĝo. Sed mi pensis ankaŭ pri la malo: kvankam mi neniam ludis rolojn de pozitiva tipo, tamen maljunulon de negativa tipo mi iam ludis kaj kun certa sukceso; kaj krome mi ankaŭ povas uzi mian kapablon por fari humoraĵojn en la prezentado por plaĉi al la rigardantaro.... Kaj kun tiaj egoismaj konsideroj mi faris la provludon.

Post la unua prezentado, miaj kolegoj kaj rigardantoj elmetis al mi multajn kritikojn. Ili diris, ke mi ne sukcesis prezenti la heroon, ke mi fuŝis la rolon ridindigante la heroon per humoraĵoj ktp. Sed tiam mi pensis, ke mi ja ne volas ludi tiun rolon jam de la komenco!

Por ke mi pli bone ludu la rolon, la respondeculo de la trupo konsilis, ke mi iru sperti la vivon en Ĉenĝi-komunumo, kie laboras la modela bredisto Vang Ĉuanhe, homo amanta la kolektivon same kiel la heroo Hju la Tria en la opero.

Antaŭ ol iri tien mi jam aŭdis pri iuj el liaj modelaj faroj. Mi pensis en mi: Ĉu vere troviĝas tia kamparano, kiu mem vivas modeste kaj loĝas en kaduka kabano, kaj tamen memvole donas al la komunumo siajn pli ol 1000 juanojn da ŝparmono por konstruado de staloj? Ĉu vere povas okazi tia afero, ke eksigite de la estro de la produkta brigado, li ankoraŭ zorgadas pri la brutoj de la kolektivo kaj ŝtele revenas en profunda nokto al la bredejo por ilin pririgardi? Estas nekompreneble, nekredible!

Mi ekkredis tion nur post kiam mi vivis kelkan tempon ĉe Vang Ĉuanhe kaj propraokule vidis la novajn stalojn kiujn li konstruigis por la produkta brigado kaj la kadukan kabanon en kiu lia familio loĝas. Estas vere, ke ekzistas tiaj homoj!

Tie mi multe aŭdis kaj vidis, kiel Vang Ĉuanhe amas la kolektivon. Ekzemple, kaŭze de tio, ke en la malnova socio li laboregis kiel dungito por bienuloj dum duono de sia vivo, li havas multajn malsanojn. La gvidantaj funkciuloj sendis lin al hospitalo por kuraco. Post ekzameno, la kuracisto diris al li, ke li devas resti tie por kuracado por du monatoj. Tion aŭdinte, li malpacientiĝis kaj diris: “Du monatoj! Eĉ unu nokton mi ne povas resti. Nun, kiam la agrikulturaj laboroj estas tre intensaj, mi ja ne povas lasi la brutaron esti malbone zorgata.” Apenaŭ li finis la parolon, li jam sin turnis dorsen kaj revenis. Li ja estas tia homo, kiu rigardas la interesojn de la kolektivo pli gravaj ol sia vivo.

Vang Ĉuanhe ne nur amas la kolektivon, sed ankaŭ tre zorgas pri siaj klasaj fratoj. En lia vilaĝo loĝis maljunulo ĝuanta la kvin garantiojn de manĝaĵo, vestoj, hejtaĵoj, edukado de infanoj kaj enterigo. Lia naskiĝloko estas en Henan-provinco. Pro malsano, li deziris reiri al sia naskiĝloko. Sciiginte pri lia sopiro, Vang Ĉuanhe tuj pretigis monon por dupersona vojaĝ-kosto kaj persone akompanis la maljunulon veturi al Henan-provinco.



Post kiam malkaŝigis la fiago de Pan Fagia (la unua de maldekstre), la brigadestro (la tria de maldekstre) ne plu suspektis pri Hju la Tria (la kvara de maldekstre) kaj denove konfidis al li la bredistan postenon.

Ĉio, kion mi vidis kaj aŭdis, min konvinkis, ke Vang Ĉuanhe vere estas nobla malnova malriĉkampano estiminda kaj aminda. Antaŭ miaj animaj okuloj, li plialtiĝis kun ĉiu tago. Ke antaŭe mi ne kredis la ekziston de tia homo, tio pruvis nur, ke mia politika konscio estas malalta kaj mia egoisma starpunkto estas ankoraŭ ne ŝanĝita, ke mi ankoraŭ ne havas proletajn pensojn kaj sentojn kaj mia spirita mondo estas tro malvasta por enteni la gigantan figuron de la nov-epoka heroo.

Vang Ĉuanhe donis al mi vivan lecionon. Mi ne nur ne plu dubas, sed eĉ opinias, ke la heroo en la reala vivo estas ankoraŭ pli alta ol la figuro priskribita en la opero. Mi ĉagreniĝis, ke mi ne povis sukcese prezenti la heroon.

La unuafoja vivospertado senigis min je la dubo kaj ŝanĝis mian opinion. Sed en prezentado mi ankoraŭ ne povis bone kapti la animstaton de la heroo. Ekzemple, en la opero, Pan Fagia batas tirbruton dum plugado de sia rezervata privata parcelo. Sciiginte pri tio, Hju la Tria indigniĝas kaj severe lin kritikas. Ludante ĉi tiun parton, mi pensis, ke ioma bato al bruto ja estas oftajo kaj lia ekscitiĝo ŝajnas troajo. Mi do ne emfazis tiun detalon. Alia ekzemplo: Eksigite Hju la Tria ne povas endormiĝi dum nokto kaj ŝteliras por pririgardi la brutojn en la stalo. Per tio ĉi la opero bone montras al ni la noblecon de la maljunulo, sed mi prezentis lin en tiu sceno kiel homon en malĝojo kaj deprimiteco, kiel homon senprincipan. Mi ne povis elmontri la verajn pensojn kaj sentojn de la malriĉkampano. Duafoje mi venis al Vang Ĉuanhe, manĝis kaj loĝis ĉe li kaj laboris kune kun li por observi lian karakteron kaj lerni liajn pensojn.

Vang Ĉuanhe iam rigardis mian ludadon. Iutage, dum ni interbabilis pri la opero, li diris: "Kiam la brigadestro vin eksigis, vi tuj foriris ĉagrene kun via litaĵo kiel miskulpigito, tute sen batalvolo. Se mi estus en tia situacio, mi ne tiel agus. Eksigite, mi tamen

tute ne pensus, ke mi estas vere eksigita. Mi nepre irus interparoli pri tio kun gvidantaj kamaradoj." Li diris al mi ankaŭ, ke ankaŭ li iam estis eksigita de la brigadestro kaj lia litaĵo estis eljetita el la stalo. Tiam li larmis, tamen ne pro tio ke li sentis sin miskulpigita, sed pro timo, ke post lia ekscito oni eble anstataŭigos lin per homo nefidinda, kiu krude traktos la ŝarĝbrutojn kaj malbonigos la produktadon de la kolektivo.

Liaj vortoj min hontigis kaj ĝojigis samtempe. Mi hontis, ke mi kutimas konsideri antaŭ ĉio pri miaj propraj interesoj ĉe ĉiu ajn afero, kaj per la burĝaj pensoj kaj sentoj mi komprenis kaj anstataŭigis tiujn de la heroo opiniante, ke la burĝaj estas naturaj, sekve neŝanĝeblaj; mi distordis la figuron de la heroo. Mi ĝojis, ke mi pli profunde komprenas la heroon, kiu ĉiam pensas unue pri la interesoj de la Partio kaj la kolektivo kaj neniam zorgas pri la personaj gajno kaj perdo de si mem. La nobleco de Vang Ĉuanhe ja ne estas fikcia.

Poste, ni refoje faris ŝanĝon en la sceno por emfaze prezenti la animstaton de la heroo, ke li unuflanke timas, ke oni malbone traktos la brutojn, kaj aliflanke li kredas, ke li estas senkulpa kaj la brigadestro finfine ekkonos sian eraron. Dank' al tio, la heroo figuro prezentiĝas ankoraŭ pli nobla.

Ekde tiu tempo, ludante la rolon de Hju la Tria, mi ĉiam pensis pri Vang Ĉuanhe. Mi ekhavis intimajn sentojn por ili ambaŭ. Dank' al tio mi fariĝis certoplena kaj trankvila ludante sur la scenejo, kaj ekpovis prezenti la figuron pli versimile kaj plastike.

Profunda spertado pri la vivo de la kampanoj ne nur helpis min pli bone ludi la rolon de Hju la Tria, sed pli grave helpis min ekkoni miajn egoismajn pensojn. Mi profunde komprenas, ke por krei heroajn figurojn de laboristoj, kampanoj kaj soldatoj oni devas longe vivadi inter la laboristoj, kampanoj kaj soldatoj kaj reformi siajn ideologion kaj sentimenton laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ.

La Ridindaj Usonaj

“Strategiaj Aeroplanoj”

POR savi sian malvenkegon sur la batalkampo en suda Vjetnamio, la usona imperiismo lastatempe enkondukis novan armilon — la strategia bombaviadilo B-52. La 17-an de junio, tuj post kiam tiaj aviadiloj faris furiozan bombadon kontraŭ liberigita regiono de suda Vjetnamio, la parolanto de la usona armeo deklaris, ke tiu ĉi estas la “unua fojo” en kiu ili uzas la aviadilojn de la strategia aerarmeo en batalo. Ankaŭ la usona propaganda maŝinaro faris militan ĉantaĝon profitante la okazon.

Multegajn aeroplanojn la usonaj agresantoj jam sendis al la batalkampo de suda Vjetnamio, kial ili pritaksas ĝuste tiajn aeroplanojn aparte gravaj kiel pajlon por dronanto?

Ĉar inter la usonaj militaj aviadiloj, la bombaviadiloj kaj batalaviadiloj estas ĝenerale klasigitaj en du kategoriojn. Kiuj havas la taskon ĉefe por fari aerbatalon, subtenadon ĉe la batalkampo kaj bombadon ĉe la fronto, estas nomataj taktikaj aviadiloj. Kiuj havas la taskon

ĉefe por profunde enpenetriĝi en la malamikan landon kaj bombi gravajn strategiajn celojn de malproksima distanco, estas nomataj strategiaj aviadiloj, kiuj povas flugi longan distancon kaj porti grandan kvanton da bomboj kaj ankaŭ kapablas porti nukleajn bombojn. De tia ĉi speco estas la aviadilo B-52.

Efektivigante sian kontraŭrevolucion tutgloban strategion, la usona imperiismo lokis pli ol duonon de siaj taktikaj aerflotoj en diversaj lokoj eksterlande, sed la strategiajn aviadilojn ĝi lokis en la enlandaj aerbazoj, kiel “hejmgardan amuleton”. Preparante sin por disvastigi sian agresan militon kontraŭ sudorienta Azio, ĝi ŝtele translokis strategiajn bombaviadilojn de tipo B-52 al la insulo Guamo en Pacifiko en marto de la lasta jaro. Tio estis la unua fojo por tiaj aviadiloj, ke ili estas lokitaj en eksterlanda aerbazo. La 30 B-52 aviadiloj, kiuj bombis la liberigitan regionon de suda Vjetnamio, elflugis el Guamo. Tiu tipo estas nun la ĉefa forto de la usonaj strategiaj aviadiloj.

* KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ *



30-TAGA HORLOĜO

La horloĝo kun la komerca marko “Tri Kvin” produktata en Ŝanhajo nun povas funkcii daŭre 30 tagojn anstataŭ 15 tagoj antaŭe, dank’ al perfektigo de teknologia procedo fare de la laboristoj kaj teknikistoj de la fabriko. Ĝi fariĝis la plej longe iranta horloĝo kun pendolo en Ĉinio. La taga miso de tiu nova horloĝo estas 30 sekundoj.

ELEKTRO TRANS LA FLAVAN RIVERON

En Bohaj-ebenaĵo de Ŝandong-provinco estas konstruita lastatempe alttensia elektrotranssenda linio por agrokultura uzo. Ĝi longas pli ol 130 kilometrojn, kiel la plej longa en la provinco de sia speco. Ĝi servas

por sendi elektron trans la Flavan Riveron kaj krei kondiĉon por elektrigi la agrokulturon en la mal-supra baseno de la Flava Rivero.

ŜOSEA KONSTRUADO EN INTERNA MONGOLIO

Estas malfermitaj al trafiko ekde la lasta jaro entute pli ol 20 ŝoseoj kun totala longeco de pli ol 2000 kilometroj en brutbredaj kaj montaj areoj de Interna Mongolio, kie estas multe enloĝataj de mongoloj: La totala longo de aŭtoŝoseoj de la tuta regiono de Interna Mongolio estas 16-oble pliigita, kompare kun la tempo tuj post la Liberiĝo. Ĉiuj gubernioj kaj flagoj nun estas ligitaj per aŭtobusoj.

NOVAJ SPECIOJ DE SORGO

8 novaj specioj de sorgo estas elkulturitaj per hibridigo de la Instituto pri Genetiko de la Ĉina Akademio de Sciencoj. Tiuj novaj specioj estas provkulturitaj entute

ĉirkaŭ cent fojojn de pli ol 60 agrokulturaj organizoj en pli ol 10 provincoj, urboj kaj aŭtonomaj regionoj en la norda kaj suda partoj de Ĉinio, kun rezulto de pliprodukto je 50 ĝis pli ol 100% kompare kun la ordinara specioj. La areo de provplantado ampleksas preskaŭ 20,000 muojn.

La novaj specioj havas fortajn trunkojn, pli multajn efikajn stipojn kaj pli altan proporcion de spikiĝo. La pezo de la grajnoj de unuopa spiko kaj unuopa planto kaj de mil grajnoj estas pli alta ol la ordinara specioj. Ili estas pli rezistemaj kontraŭ sekeco, malsekeco kaj salalkaleco.

PLIPRODUKTO DE ŜAFIDOJ EN KINGHAJ

En la paŝtregionoj de Kinghaj-provinco, la vartataj ŝafidoj estas pli multaj ĉijare ol en la lasta jaro je pli ol 200,000. Ili nun bone kreskas kun fortika korpo.

Kiajn "mirindajn" kvalitojn havas la aviadilo B-52 entute? Laŭdire ĝi povas flugi 16,000 kilometrojn kaj porti pli ol 10 tunojn da bombo.

Estas facile kompreneble, ke al tia "mirinda" armilo Johnson k.s. metis sian senliman esperon, enkondukante ĝin en sian agresan militon en suda Vjetnamio. Sed bedaŭrinde la fakto ne akordas kun ilia deziro. La aviadilo B-52 je sia debuto, kiu kostis 20 milionojn da usonaj dolaroj, "nur bombfosis nombron da kavoj en senhoma areo". La militflugo ne nur atingis nenion menciindan, krome dum la flugado du el la aviadiloj B-52 interpuŝiĝis kaj falis en la maron.

Kial la strategiaj aviadiloj de la usonaj agresantoj, same kiel iliaj taktikaj aviadiloj, malsukcesis kaj bankroitis antaŭ la heroaj trupoj kaj popolo de suda Vjetnamio? La kaŭzoj estas:

1-e, la aera bombado ne povas solvi la surteran batalon. La areo furioze bombita de la aeroplanoj B-52 troviĝas en arbaro 40 kilometrojn fore de Sajgono. Post enverŝo de ĉirkaŭ 300 tunoj da bomboj per B-52, la uson-pupa trupo eniris en la areon, sed ĝi same renkontis embusojn kaj estis elpelita el la arbaro. La agresantoj povis eniri la areon nek antaŭ la bombado nek post la bombado.

2-e, la usonaj agresantoj fanfaronis ke strategiaj aviadiloj kapablas fari "neniigan" bombadon. Tio fakte estas nur trompo el sintrompo. Se la "neniiga" efiko kuŝas en la grandeco de la kvanto de ĵetitaj bomboj, iliaj aviadiloj jam faris la t. n. "saturajn bombadojn"

antaŭ la uzo de siaj strategiaj aviadiloj B-52. La 15-an de aprilo ĉijare, la usonaj agresantoj uzis 230 aviadilojn, kolektitajn el siaj tera, mara kaj aera armeoj, portuttago bombadi arbaran areon ampleksantan nur 8 kvadratajn mejlojn, situantan nordokcidente je 100 kilometroj fore de Sajgono, de mateniĝo ĝis vesperiĝo. Entute 1010 tunoj da bomboj estis ĵetitaj. Sed la parolanto de la usona armeo ne povis ne konfesi post la kontrolo pri la rezulto de la aeratako, ke "oni trovis neniun pruvon por atesti ke tiu grandaskala aeratako mortigis efektive iujn homojn". Eĉ se la strategiaj aviadiloj povas porti pli da bomboj, kian apartan rezulton ili povus alporti?

3-e, la Liberiga Armeo de suda Vjetnamio jam kaptis al si la iniciatan povon kaj ĉie batas la usonajn agresantojn kun plena aktiveco kaj vigleco. Sur la batalkampoj de suda Vjetnamio, eĉ la plej rapidaj batalaviadiloj de Usono estas lacigitaj de flugado kaj povas fari nenion alian ol esti batataj. Kion povas fari ĉi-okaze la pezaj strategiaj aviadiloj? Krome, la tipo B-52 havas la plej grandan rapidecon nur de 1000 kilometroj pohore, dum patrola flugado nur de 800 kilometroj. Ĝia korpo estas granda kiel celaĵo kaj havas malpli grandan sindefendan forton. Ĉe renkonto kun batalaviadilo ĝi malfacile eskapus de puno.

La senskrupula ekuzo de strategiaj aviadiloj de la usona imperiismo kontraŭ la popolo de suda Vjetnamio ĝuste spegulas ĝian seneliran kaj agonian situacion. Se ĝi nur volas daŭre restadi en suda Vjetnamio, nenia armilo povos savi ĝin de kompleta fiasko.

* KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ *



LA KONCERTO POR VJETNAMIO KONTRAŭ USONO

La 30-an de majo, en Pekino okazis amasa koncerto, kiun partoprenis laboristoj, soldatoj, studentoj, armitaj milicanoj, infanoj kaj muzikaj laborantoj. En la koncerto oni prezentis pli ol 30 kantojn kaj muzikaĵojn temantajn pri helpo al Vjetnamio en ĝia rezisto kontraŭ la usona agreso, kiujn nove verkis muzikistoj de Ĉinio kaj Vjetnamio kaj ĉinaj muzikaj amatoroj. Kuna kantado kaj kriado de sloganoj sur kaj sub la scenejo dum la prezentado karakterizis la koncerton.

Tran Tu Binh, ambasadoro de la Demokratia Respubliko de Vjetnamio al Ĉinio, Nguyen Minh Phuong, anstataŭa ĉefo de la Konstanta Delegacio de la Naciliberiga

Fronto de Suda Vjetnamio al Ĉinio, vjetnamaj specialistoj, studentoj k.a. partoprenis la kunvenon laŭ invito.

FILMO-SEMAJNO POR CELEBRI LA 20-JARAN DATREVENON DE LA VENKO SUPER LA GERMANA FAŜISMO

Filmo-semajno por Celebri la 20-jaran Datrevenon de la Venko super la Germana Faŝismo okazis en majo ĉijare en pluraj grandaj urboj de Ĉinio. Dum tiu memoriga filmo-semajno oni ludis 24 filmojn. Inter ili estas la sovetiaj filmoj "Grand Turnopunkto", "Stalingrada Batalo", "Falo de Berlino", "Aleksandro Matrosov", "Zoja", la albana filmo "Ŝtormo", la germanaj filmoj "Ernst Thälmann", "Teŭtona Glavo Funkcias", "Konsilio de Dioj", la pola filmo "Bordera Strato", la rumana filmo "La Danubo Iras Sian Vojon", la ĉeĥoslovaka filmo "Silenta Barikado" k. a.

MOVEBLAJ LERNEJOJ EN TENDOJ

En Sugitan de la Menjuan-a Huj-nacia Aŭtonoma Gubernio de Kinghaj-provinco fondiĝis 5 moveblaj elementaj lernejoj duonpaŝtadonlernaj en tendoj. La paŝtistoj tre ĝojas pro ilia apero kaj diras, ke tiaj lernejoj estas laŭbezonaĵoj kaj oportunaj por la klerigado de iliaj infanoj.

Por koncentre fari instruadon al la infanoj, tiuj tendolernejoj estas starigitaj en dense loĝataj lokoj. Kiam la paŝtistoj devas translokiĝi kun siaj infanoj kaj brutaro por paŝtado, ankaŭ la instruistoj translokiĝas kune kun ili por daŭre donadi lecionojn. Kaj oni aranĝas la lernadon tiel, ke ĝi multe utiligu la pluvajn tagojn kaj la serenajn tagojn estu uzataj pli multe por laboro. Meznombro, la infanoj povas lerni 3 horojn ĉiutage.

BATAL-TAMBURADO ĈE L' EKVATORO

— Skizo pri ĝia sursceneja prezentado —

La “Batal-tamburado ĉe l' Ekvatoro” prezentita en Pekino de la Moderna Drama Trupo de la Politika Departemento de la Ĉina Mararmeo akre kaj reliefe manifestas la grandan vekigon de la popolo de Kongolando (Leopoldvilo). La popolo de Kongolando, kiu ne volas toleri la kruelan sklavigadon de la novaj kaj malnovaj koloniistoj, rompis la katenojn, ekprenis armilojn kaj ekbruligis flamegantajn revolucian fajron sur la tero de la nigra Afriko, entreprenante heroan, obstinan lukton kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj. La dramo certigas al ni, ke la stariĝinta popolo de Kongolando (Leopoldvilo) certe venkos ĉiajn malfacilojn kaj rompos ĉiajn barojn sur la vojo de sia antaŭenmarŝo kaj batalakiro la finan triumfon de la revolucio.

Jen mia konciza priskribo pri la dramo:

Prologo: LA BATALANTA KONGOLANDO

Iom post iom malheliĝas la lamplumoj.

De malantaŭ la kurteno aŭdiĝas adaĝa, obtuza kaj indignoplena melodio. Kiel plorĝemo de la rivero Kongo, ĝi akuzas antaŭ la tuta mondo la koloniistojn pri ilia kruelega persekuto al la popolo de Kongolando. . . . La potenco kaj patosa deklamo de poemo tuŝas la korojn de la tuta rigardantaro:

Ho, Kongo! Mizerplena Kongo!

Dum la lastaj okdek jaroj

Katenita, tutvundita

Vi vivis en longaj tagoj brutalaj.

Subite, forta ruĝa lumo heligas la scenejon kaj iu negra frato ĉirkaŭligita de ĉeno eklevas la nesubigeblan kapon kaj skurompas la pezajn katenojn sur sia korpo.

Sendependeco estas ne petakirebla.

Por libereco devas ni batali per armiloj!

Por liberigi viajn nigrajn korpajn

Vi devas utiligi viajn nigrajn manojn!

Leviĝu, al batalo,

Vi, antaŭiranta kontinento,

Ekvekiĝinta vi Afriko!

Ektondris batal-tamburado ĉe l' ekvatoro.

Kongolando, al batalo!

Flamas fajrego kaj en ĝia lumo la nigraj fratoj frapas longan tamburon. Intensa kvazaŭ pluvego kaj forta kvazaŭ galopo de miloj da ĉevaloj, la tamburado vokas al batalo. Ĝi alvokas leviĝi kaj batali la popolon, kiu deziras sendependecon kaj liberecon.

Unua Sceno: OKTAGA SENDEPENDECO

Iutage ĉe la komenco de julio, 1960. En la ĉefurbo de la nove naskita Respubliko de Kongolando Leopoldvilo, antaŭ la pompa oficejo de la forpelita eks-generalgubernatoro belga, kolektiĝas freneze jubilantaj homamasoj. Kun naciaj standardoj kaj sennombraj portretoj de Lumumba en la manoj, ili ĝojkrias kaj freneze dancas. Sendependeco, sendependeco! Dum la pasintaj pli ol okdek jaroj, el la tridek milionoj da nigraj fratoj en Kongolando, pli ol dek sep milionoj estis efektive buĉitaj aŭ forvenditaj de la koloniistoj! Kiel oni povas elporti tian teruran kruelaĵon! Niaj nigraj fratoj entreprenis longtempan lukton per siaj sango kaj vivoj. Hodiaŭ, sub la gvido de Lumumba, ili finfine reakiris la longe atenditan sendependecon!

Oni estas ravitaj de la sendependiĝo. Iu honesta patriota intelektulo nomata Valko nereteneble a'parolas Roĉali apud si per poeziaj vortoj: “Roĉali, ni vere sendependiĝis! Sendependeco kvazaŭ kokosa vino incitas niajn korojn furioze bategi kaj ravas nin kvazaŭ pavado. . . . La sendependiĝo ĝojigas nin popolanojn de Kongolando ĝis freneziĝo!” Kun larmaj okuloj Roĉali diras: “Liberiĝis ankaŭ mi, servistino en la oficejo de la belga generalgubernatoro!”

Molobo



*Ilustris
Liu He*

La sendependiĝo venigis ankaŭ Onklon Mukania de la kamparo al la jubilanta ĉefurbo. Li estas patro de Roĉali, bonkora simplanima laboristo senokupa. Li venis kun sia plejaĝa filo Milindi. Altkreska kaj neekscitiĝema, Milindi estas unu el la gvidantoj de la liberiga batalo.

Alia ĝojiga novaĵo: Revenis la politika krimulo Molobo, kiu estis devigita fuĝi eksterlanden pro la persekuto de la belgaj diabloj antaŭ kvar jaroj! Kiel en sonĝo Roĉali ĉirkaŭprenas Molobo-n ankoraŭ tiel malkaŝeman kaj optimisman. Ŝi apenaŭ povas kredi, ke efektive revenis ŝia edzo.....

Rigardante al siaj infanoj, la maljuna Mukania estas eksterordinare ekscitita: “.....La sendependiĝo alportis al ni rekuniĝon de la tuta familio. Feliĉe mi ĝisvivis la sendependiĝon antaŭ mia morto!.....”

Sendependiĝo, sendependiĝo! Ĝuste je la momento kiam niaj negraj fratoj prijubilas la sendependiĝon, oni planas novan intrigon, alvenas al Kongolando novaj koloniistoj pli insidemaj kaj pli kruelaj ol la malnovaj.

De proksime, subite aŭdiĝas knaro de aŭtobremso. Iu delegito de Ĉombe-kliko nomata Ĉondra alkondukas aron da usonanoj reprezentantaj la instancon de UNO, por transpreni la oficejon de la belga generalgubernatoro.

Kapitano Gilbert de la usona armeo, la blankvizaĝa lupu kun nazo ĉielen montranta, parolas kvazaŭ psalmante: “.....Per la reputacio kaj potenco de Usono, ne, de UNO, mi venas protekti vin, forpeli la belgojn, ekstermi koloniismon.....”

Bela parolo, dolĉa kiel mielo! En la antaŭan kuŝejon de diabloj nun enloĝiĝas lupoj! Ĉu tio estas la sendependeco longe sopirata de niaj fratoj en Kongolando?

Dua Sceno: LA OAZO EN TUMULTO

Duonjaron post kiam UNO entrudiĝis en Kongolandon (Leopoldvilo).

En la vintro ĉe la ekvatoro, la suno estas ankoraŭ brulige arda. La sufokantaj varmaj aerfluoj ruliĝas blovon post blovo. Anhelas ankaŭ la kokosarboj. Oni ĝuis sendepandan vivon nur ok tagojn, kiam envenis

UNO. Duonjaron post la alveno de UNO, vezike diskrevis la sendependeco kaj niaj negraj fratoj denove enfalis en abismon de malfeliĉego.....

Sur la scenejo vidiĝas sceno de tumulto kaj malkvieto. En la ĉielo muĝas usonaj aeroplanoj kaj malproksime sur la tero estas usona aerodromo plivastigata. Aro da negroj kaj negrinoj, kiuj estas devigataj konstrui la aerodromon, estas portantaj pezajn lignajn kestojn en ekstrema lacigiteco kaj senkompate vipataj de usonaj soldatoj. Ili preterpasas la lignan kabanon de Onklo Mukania.....

“Tutnokte ni atendis la tagiĝon. Tagiĝis, tagiĝis! Sed la tag’ nubiĝis! Ni preĝis al Dio kaj diris Dio: hodiaŭ regas la dolar’ usona super ĉio!” La senokupa intelektulo Valko por vivpano kontraŭvole portanta reklaman vestaĉon, sur kiu skribiĝas “Viskio Paco”, ŝanceliras ebrigiĝita zumante satiran poemon kun senlima doloro. Nun li fariĝis “komercaĵo disvendanta komercaĵojn”! Al Onklo Mukania kaj Roĉali li rakontas la indignon en sia koro: “Aŭskultu! La tuttage senĉesaj transport-aeroplanoj transportas ĉi tien UNO de Usono. Ĉu la pendigendaj paraŝutistoj venas por helpi nin sendependiĝi?!..... Aerodromoj, aerodromoj, ĉie estas konstruataj aerodromoj! La aeroplanoj kun bomboj ja ne estas packolomboj!”


Kiam Valko ankoraŭ malbenas: “Ĉombe, Mobutu, ambaŭ lakeoj, lokaj vipuroj”, alvenas Mvanka. Li estas supera soldato en la armeo de Mobutu. Senartifika kaj simplanima, li estas trompita de la “dolĉaj vortoj” de la usonaj koloniistoj kaj ankoraŭ ne vekigis. Sin ĵetante al Valko, li krias: “Fripono, vi kuraĝas insulti la komandanton de la negroj!”

Tria Sceno: LA BAJONETO SUB LA “OLIV-STANDARDO”

Ĝuste en la posttagmezo de la sama tago, eksterordinare kruela intrigo estas streĉe aranĝata en la oficejo de la Konsilantaro de UNO.

Alte super la fera pordego kaj la ĉirkaŭaj muroj de la oficejo estas hisita la standardo de UNO kun bluj

Mvanka



Mukania kaj Beri



Valko





Sub ŝildo de la Unuiĝintaj Nacioj, la usona imperiismo strangolis la sendependecon de Kongolando (L.), malliberigis Lumumba-n, kaj la popolo de Kongolando (L.) estas ree puŝita en abismon de suferoj.

olivfolioj sur blanka fono. La oficejo estas streĉe gardata de usonaj soldatoj kun fusiloj ŝargitaj kvazaŭ batalonte kontraŭ potencaj malamikoj.

La plej alta konsilanto de la Agentejo de UNO Vajne sidas sur blanka liana seĝo sub laŭbo de glicineo. Tiu ĉi usona generalo aspektas dignoplena kaj ĝentilama, sed fakte li estas terure insidema kaj malicega. Li ĵus sendis iun por fari la lastan intertraktadon kun Lumumba, intencante subigi Lumumba-n kaj ekstermi la patriotajn fortojn per lia voĉo. Se tio malsukcesos, li subaĉetos iun soldaton de Mobutu kaj utiligos liajn manojn por murdi la gvidanton de la negroj. Kia intrigo! Tian fiagon faras la jankioj sub la standardo de UNO!

Tiam Ĉondra, reprezentanto de la naciperfidulo de Kongolando Ĉombe, alvenas al la oficejo de la Konsilantaro de UNO. Li jam elektis por Vajne iun "simplaniman" negran soldaton. Tiu estas Mvanka, la plej juna filo de Onklo Mukanja. Ĝuste kiam Vajne estas dononta al Mvanka la "sekretan mision", iu usona oficiro envenas kaj raportas la viziton de s-ro Lubens, la belga eks-general-gubernatoro por Kongolando (Leopoldvilo) kaj la nuna direktoro de la Katangaa Minindustria Kompanio.

Laŭ la ordono de la Belga Registaro s-ro Lubens venas por intertraktado. Tiu ĉi ruza politikistaĉo estas kaj hipokrita kaj ceremoniema. Vajne invitas lin sidiĝi. El la du "malnovaj amikoj", unu estas lupro dum la alia kaŝas ponardon sub la rideto. Unuvorte, ili ambaŭ estas egale ruzaj rivalantoj. Tiu ĉi sceno vivvivece priskribas la malbelajn trajtojn de la nova kaj malnova koloniistoj kaj ilin plenplene malkaŝas. Jen estas parto de ilia interesa dialogo:

.....

Lubens: Rilate al la problemo de Kongolando, vi jam metis nin en pozicion de akuzito. Kial do vi ankoraŭ ŝargas nin per respondeco?!

Vajne: Sed da rajtoj vi ja forlasas nenion!

Lubens: Nun ni troviĝas en granda malfacilo. La malkaraj materialoj estas forportataj de vi. Eĉ niajn plej fidindajn Ĉombe kaj Ĉondra vi klopodas fortiri de ni. Memoru, ke en la Katangaa Minindustria Kompanio mi estas la direktoro!

Vajne: Nun vi mencias tion, mi konfesu, mi estas iom mirigita. Ĉombe kaj Ĉondra estas ankoraŭ vivantoj. Ili povas libere elekti sian vojon. Materialoj estas varoj. Kiam ili estas transportitaj al Usono, oni pagas usonajn dolarojn. Kiam ili estas transportitaj al Belgio, oni pagas belgajn frankojn. Jen afero justa!

Lubens: Stranga logiko! Enpoŝigi la monon forprenitan el alies poŝo kaj nomi tion afero justa?

Vajne: Mia amiko, dum via okdekjara restado en Kongolando, dekoj da miliardoj da usonaj dolaroj fluis en viajn poŝojn. Estas Kongolando, kiu vivtenis vin. La bifstekoj sur via manĝotablo estis nenio alia ol la encefalo de la popolo de Kongolando!

Lubens: En Kongolando vi fariĝis parvenuo. La koktelo en via festeno estas nenio alia ol la sango de la popolo en la kvin kontinentoj de la mondo.....

.....

Vajne: Oni diras, ke ni kune portas unu saman pantalonon!

Lubens: Sed vi jam tute nudigis nin!

Vajne: Amiko, en Kongolando ni jam tre bone prizorgas la interesojn de via lando. Sen ni, vi tute ne povas resti en tiu ĉi lando!

Lubens: Via generala moŝto, Kongolando (Leopoldvilo) estas dependa teritorio de Belgio. Ĉi tie estas Afriko sed ne Ameriko!

Vajne: Se ĉi tie estas Afriko, kial vi venis ĉi tien de Eŭropo?

Lubens: Kaj kial vi venis ĉi tien de Ameriko?

Kvankam la disputo estas furioza, tamen la nova kaj malnova koloniistoj fine trovas "komunan lingvon" por strangoli Kongolandon!

Lubens estas apenaŭ foririnta, kiam Vajne ricevas ekspresan telegramon, kiu raportas ke Lumumba rifuzis submetiĝi. Li sendas iun por tuj venigi Mvanka. Li promesas doni al Mvanka "ordenojn, usonajn dolarojn, postenon de registara funkciulo kaj belulinon" kaj "mondvojaĝon" kondiĉe nur ke li murdu Lumumba-n!

Tio estas tondrego en hela tago! Antaŭ la kruela fakto vekigis la "simplanima" Mvanka el sia trompiteco. Kiel mono aŭ belulino povus konkeri la puran koron de nia negra frato! Mvanka preferas oferi sian vivon ol

mortigi sian estimatan negran gvidanton! Tutkolera, li tuj pugnigas sian manon kaj forte batfaligas Vajne sur la teron!

Kvara Sceno: LA JUSTA PAFO

Sur la ĉielo briletas disaj steloj kaj lunarko. Vasta arbaro ekster Leopoldvilo. La katenita Mvanka claŭtiĝas eskortita de usona negra soldato Varen.

Mvanka staras kun elstaranta brusto kaj levita kapo. Varen celas lin per fusilo. Kaj apud Varen alia usona soldato celas Varen per fusilo por mortigi la mortigonton kaj teni la sekreton!

Mvanka krias laŭte: “Memoru! Iam la popolo de Kongolando nepre venĝos al vi la sangan ŝuldon. Pafu!” Eksonas pafado! Sed falas ne Mvanka. Fakte Varen mortigis la kruelan usonan soldaton. Longtempe turmentite de la usonaj rasistoj, la negra frato Varen de Usono havas la saman sorton kiel la negraj fratoj en Afriko. La maljuna patro de Varen estis surarbe pendigita simple pro tio ke li senintence tretis piedon de blankulino sur la strato.....Hodiaŭ ankaŭ li vekigis kiel Mvanka.

Molobo, kiu jam sukcesis sin dungigi al la usona konsilanto kiel ŝoforo por faciligi sian revolucionan laboron, haste venas por savi Mvanka. Forte kortuŝita li firme premas la manojn de Varen kaj diras: “Komuna sufero kaj komuna malamo ligas nin kune. Vi ja estas vera negra infano!”

Kvina Sceno: BATAL-TAMBURADO ĈE L' EKVATORO

Elkrepuskiĝo de la sekvanta tago. En la matena sunlumo la ekstreme lacigitaj Mvanka kaj Varen rampe revenas al la hejmo de la maljuna Mukania, al siaj karuloj.

Mvanka indigne rakontas al sia patro Mukania kaj sia fratino Roĉali ĉion, kio okazis hieraŭ. Piedbatante kaj frapante al si la bruston, li diras: “Mi vekigis! Mi vekigis! Kiel mi deziras frakasi la fiulojn per mia pugno!.....”

Ĝuste tiutempe, Valko venas raportiti: La patriota gvidanto de Kongolando Lumumba estas finfine murdita de la usona imperiismo — UNO! Ĉiuj treege indignas. La maljuna Mukania diras dolore: “Kruelaj rabistoj! Damnindaj murdistoj! Vi trompe forprenis nian teron per la Biblio kaj forpelis nian liberecon per militŝipoj! UNO.....vi fariĝis buĉilo en la manoj de rabistoj! Estas vi, kiuj estingis la brilan lampon en la koroj de ni kongolandanoj! Diabloj, trompistoj!.....” Milindi diras: “Paĉjo, ili trompis nin, sed ni ne devis fidi la fiulojn. Nun estas la tempo, ke ni kongolandanoj vere vekigu! Estas nenia alia elirejo, krom ke ni batalakiru nian propran Kongolandon per niaj manoj, per nia sango kaj per la armiloj en niaj manoj!” Valko diras: “La usona imperiismo — UNO faris ĉiajn malbonojn en Kongolando kaj ĉiajn malbonojn antaŭ la popolo de la tuta mondo. Niaj revoj devas finiĝi. Ni devas vekigi dank' al tiu ĉi sanga leciono! Prave diris Milindi, ke ni devas savi Kongolandon per niaj propraj manoj!” La maljuna Mukania instigas ĉiujn eniri en la arbarojn por okupiĝi pri tia grava afero, pri kia la familio Mukania neniam okupiĝis dum la pasintaj generacioj. De malproksime aŭdiĝas bruo de aŭtomobilo. Milindi, Mvanka kaj Varen forpaŝas laŭlonge de la vojeto apud montrivereto.

Brue venas aro da usonaj soldatoj, kiuj blokadas ĉiujn vojojn. La usonanoj estas ĉie serĉantaj Mvanka kaj Varen. Ŝajnigante ke li ne konas sian bopatron Mukania kaj sian filinon Beri, Molobo trankvile proksimiĝas, kun Gilbert lin sekvanta.



Mvanka (la 2-a de maldekstre) travidis la intrigon de la malamikoj.

Utiligante la ŝancon de “interpretado”, Molobo ekscias, ke Milindi kaj la aliaj du jam iris al la vojo apud la mont-rivereto. Sed tie nun embuskas malamikoj. La maljuna Mukania subite krias laŭte: “Montrivereto.....Filino, tuj iru serĉi la kaprojn!” Aŭdinte tion, Roĉali elsaltas tra la fenestro por serĉi Milindi. Sed usonaj soldatoj ŝin kaptas. S-ro Gilbert, kiu estas superruzita de la saĝo de niaj negraj fratoj, rimarkas, ke la kaptito estas Roĉali, kaj nun li komprenas, ke Molobo kaj Mvanka apartenas al la sama familio.

Arestita estas Molobo, sed li restas aplomba kiel antaŭe. Facile kaj sprite li diras: “S-ro Kapitano, permesu al mi tamburi kaj danci por adiaŭi la familianojn laŭ la tradicia kutimo de la kongolandanoj.”.....Forte eksonas tamburado. Ĝi ne estas ordinara tamburado, sed “tambur-parolo” alvokanta Mvanka, Milindi kaj Varen: “Rapide revenu kaj kaptu la aŭtomobilon.....” Ekaŭdiĝas de malproksime pafado. Milindi kuregas malsupren de la montvojeteto, faligas la soldaton kaj forkaptas la aŭtomobilon. Niaj batalantoj saviĝis! La jankioj ne povos kuratingi ilin plu! La amaso krias: “Uhuru” (Libero)! Gilbert ekpafas kaj Molobo vundiĝas, sed gvidante la aliajn li ankoraŭ sin ĵetas sur la malamikojn.....

Sesa Sceno: LA VOJO AL LIBERO

Iun vesperon post tri jaroj.

Malhela fortikaĵo antikva. Antaŭe ĝi estis malliberejo uzata de belgaj koloniistoj kiam ili vendis negrojn. Nun ĝi estas karcero de la armeo de UNO por enŝlosi la tiel nomatajn “politikajn krimulojn”. Molobo, Roĉali kaj multaj aliaj senkulpaĵaj negraj fratoj estas nun malliberigitaj ĉi tie. La fortikaĵo havas “Pardon al Feliĉo”, ekster kiu estas la rivero Kongo. Tie estis la loko, kie la koloniistoj sursĝipigis la negrojn eskortatajn. Ĉimomente, la subiranta

suno estas sange ruĝa kaj plene ruĝigas la ondojn. Kongo estas kolere muĝanta.....

Kial sur la placo de promenado estas aranĝitaj tablo kaj seĝoj, kaj surtable floroj kaj viskio hodiaŭ? Kial la maljuna Mukania kaj ankaŭ la Eta Beri estas invititaj? Kial la katenoj sur la piedoj de Roĉali estas forigitaj? Kian intrigon Vajne aranĝis?

Kvankam Roĉali estas tutkorpe vundita, ŝi eligas neniun larmguton ĉu en la juĝoĉambro aŭ sur la ekzekutejo. Kiam Eta Beri palpas ŝiajn vundojn, Roĉali diras: “.....Kiel mi deziras nun elflugi el tiu ĉi diabla kaverno por kribi al ĉiuj virinoj de Kongolando: Leviĝu, fratinoj! Ankaŭ ni virinoj de Kongolando povas batali kun glavoj en niaj manoj.....”

Subite eksonoras alarm-sonorilo. Envenas Vajne, Lubens, Ĉondra kaj Gilbert akompanataj de aro da brutecaj usonaj soldatoj. Ankoraŭ tiel ĝentilhome, Vajne hodiaŭ venas por gratuli la reunuiĝon de la tuta familio Mukania, “neniigi la miskomprenon” inter si kaj Molobo kaj “inviti lin en la novan registaron”. Dum la pasintaj tri jaroj la usonanoj kaj Ĉombe-reakciularo “bone instruis” al la vasta popolo de Kongolando: Se oni volas venki, oni devas ekpreni armilojn kaj entrepreni pint-kontraŭ-pintan batalon! Dum la pasintaj tri jaroj la patriotaj armitaj fortoj de la popolo de Kongolando jam grandskale disvolviĝis! Kaj dum la pasintaj tri jaroj Generalo Vajne senĉese turnadis siajn fiokulglobojn. Li ne volas akcepti sian malsukceson kaj volas denove subfosii! Hodiaŭ lia “laŭdezira kalkulo” estas subaĉeti Molobon, vane intencante utiligi lin por mildigi kaj dispecigi la patriotan armitan luktadon de la popolo de Kongolando.

Rektiginte sian plene turmentitan korpon, Molobo gaje rigardas al siaj parencoj. Nun Vajne ordonas alporti skarpon kaj usonajn dolarojn kaj deklaras “rekomendi” Molobon kiel “parlamentanon”. Kaj Lubens promesas “dungi” lin kiel “honoran membron de la direkcio” de



Molobo (la 2-a de maldekstre) tamburante revokas la gerilanojn por frakasi la intrigon de la malamikoj.



Patriotaj batalantoj de Kongolando (Leopoldvilo) pretas embuski la malamikojn.

la Katangaa Minindustria Kompanio kaj “donaci al li grandan kvanton da senpagaj akcioj”. Je tiu ĉi farso Molobo ekridegas. Li laŭte diras: “Ŝafoj povas neniam akiri simpatian de lupoj. El la brustoj de la afrikanoj la malamikoj povas neniam eligi lojalecon!” Vajne petas lin “serioze konsideri” la aferon. Molobo gravmienne respondas: “Serioze konsideri? La historio de sklavigado al Kongolando fare de vi igis min konsideri, precipe la tri jaroj de kontakto kun vi jam donis al mi plenan tempon por konsiderado! Ŝajnitaj humanaj sinjoroj, ludante la rolon de internaciaj ĝendarmoj vi faris ĉiajn malbonaĵojn. Per paciga intrigo vi volas moligi nin kaj strangoli la revolucion de Kongolando. Vi eraras! La popolo de Kongolando neniam forlasos luktadon ĝis en nia lando ne plu troviĝos koloniismo kaj dungitaj soldatoj. Nuntempe, la pafado en la altaj montoj kaj densaj arbaroj skuis vian tronon. La fajrego ĉe la ekvatoro brulvundis vian karnon. La ŝnuro de la popolo ĉirkaŭkaptis vian kolon!”

La usona lupo ekkoleras pro honto kaj pafmortigas Roĉali. Ĉiuj karcer-kamaradoj indigne kontraŭstaras. Molobo krias laŭte: “La suno jam leviĝas ĉe la oriento. La afrika popolo jam scias kiel bonvenigi la estontecon!” Forte li eljetas la flamigan botelon donitan al li de Valko, kiu partoprenas en la subtera laboro post sia politika vekigo. En la nebulo la diabloj ege konfuziĝas kaj blinde pafas per siaj pafiloj. Ĉiuj karcer-kamaradoj luktas kontraŭ la usonaj lupoj. Laŭ la plano de forkuro el la karcero sciigita de Valko, Molobo gvidas ĉiujn trakuri la “Pordon al Feliĉo” kaj saltas en la furioze ondantan Kongoriveron.

Sepa Sceno: FAJREGO

Proksimume kvin tagojn poste.

Pulvo-fumo nebuligas la arbaron. Furioza batalado estas progresanta. Senĉese usonaj aeroplanoj freneze bombadas la regionon regatan de la patriotaj armitaj fortoj. La usonaj koloniistoj klopodas peli la gerilanojn el la arbaro kaj ilin ekstermi, sed vane!

Kun flama venĝemo, Mvanka volas gvidi la gerilanojn el la arbaro por batali kaj rekte okupi Leopoldvilon, kiam alvenas Molobo post sia forkuro el la malliberejo. Per urĝa tambur-signalilo li revokas la kamaradojn. Li diras al ili: “Nun ni traktas ne la dungitajn soldatojn de Ĉombe kaj Mobutu, sed la unuarangan malamikon de la tutmonda popolo—la usona imperiismo. Bone memoru la vojon tratritan de nia granda amiko. Enradikiĝu en altaj montoj kaj densaj arbaroj, persistu en longdaŭra luktado, eliminu la malamikojn, plifortigu nin mem kaj sieĝu la urbojn per la vilaĝoj ĝis ni atingos la finan triumfon.”

Sub la direkto de Molobo, Milindi kaj Mvanka, la gerilanoj sagace min-detruis la ponton en la kokosarbaro kaj ekstermis la malamikojn, kiuj entrudiĝis!

Fortaj batalkrioj eĥas en la senfina arbaro. Ili vekas la popolon piedprematan de la koloniistoj kaj la teron suferplenan kaj longe melankolian! Tondre sonas la batal-tamburado, kiu deklaras al la tuta mondo: Niaj nesubigeblaj fratoj en Kongolando estas farantaj novan epokon en la historio de la nigra Afriko!

Epilogo: ANTAŬEN, KONGOLANDO!

Sur la batalanta tero de Kongolando aŭdiĝas la krioj de la tutmonda popolo pri subteno al la popolo de Kongolando (Leopoldvilo).

Ŝvebas en la aero solena voĉo:

“Batalu, fratoj en Kongolando (Leopoldvilo)! Vin subtenas la tutmonda popolo! Sendependa, libera Kongolando (Leopoldvilo) nepre aperos kiel ruĝa suno ĉe la horizonto de la ekvatoro!”

La kurteno leviĝas: Liberigaj batalantoj en batalpreteco.

Molobo alten levas freŝe ruĝan standardon: “Fratoj, nia luktado ne estas izolita. La popolo de la tuta Afriko estas kun ni. La popolo de la tuta mondo estas kun ni. Ni juru: Ni batalos ĝisfine por la sendependeco kaj libereco de Kongolando!”

Ĝojkrias la amaso: “Uhuru! Uhuru!”

Esperanto, Lingvo de Paco, Ŝlosilo de la Laboranta Ĉinio

MARIE BONAFOUS, franca esperantistino

De la komenco mem de ĝia vivo, mi ŝatis la popolan Ĉinion; efektive, tuj post la liberigo de Pekino, la 24-an de oktobro 1949, mi verkis franclingvan soneton honore al ĝia senkompara gvidanto, samtempe inspirata poeto, Maŭ Zedong. Kaj, de tiu tempo, ĉiam pli kreskis mia deziro viziti tiun malnovan landon, nun tamen fariĝantan la plej novan el ĉiuj.

Tio, kio plej forte frapis min en Maŭ Zedong estis lia amo al la paco, al la konstruado, kiun nur la paco ebligas.

Efektive, ne longe antaŭe, en aŭgusto de tiu sama jaro, mi estis leginta en nia franca ĵurnalo *L' Humanité* longan, elĉerpantan artikolon de li verkitan, en kiu, dum la milito pli ol iam frenezigiĝis, la ĉefgeneralulo ne prononcis eĉ unu vorton pri siaj fulmrapidaj sukcesoj, sed nur trankvile, logike kaj samtempe elokvente kaj entuziasme detalis la programon de la profundaj kaj revoluciaj plibonigoj, kiujn li intencis efektiviĝi sur ĉiuj kampoj post la fina venko.

Fakte, jam la liberigitaj regionoj ŝanĝis sian vizaĝon.

Kaj, kiam la armiloj fine silentis, la antaŭenmarŝo de la tuta lando ĉiam pli rapide, eĉ gigante progresadis.

Jaron post jaro, mi legis ĉion ĉi, mi senĉese pli forte entuziasmiĝis kaj kompreneble aspiris veturi al la popola Ĉinio por propraokule vidi tiajn miraklojn. Sed bedaŭrinde la afero ŝajnis al mi tre malfacila.

Je la fino de 1959, iu samideano montris al mi nian belan revuon *El Popola Ĉinio*, kiun li multe ŝatis. Mi legis kaj tuj abonis ĝin.

Kaj mi skribis al ĝiaj redaktantoj, petante korespondanton, esprimante mian deziron viziti Ĉinion, kaj ankaŭ sendante al ili mian soneton al Maŭ Zedong, ties esperantan tradukon kaj eĉ mian francan unuan poemaron, kiu entenas ĝin.

Longa kaj fruktodona korespondado stariĝis inter ni, tiel ke la samideanoj de Pekino, bone komprenante mian amon al Ĉinio, fine havis la ĉarman ideon inviti min ne al simpla, turisma vojaĝo, sed por ke mi venu ĉi tien kunlabori kun ili. Estis fine de majo 1964.

La 25-an de septembro, 1964 mi alvenis al Pekino. Tuj kiam mi eliris el la aviadilo, mi estis afablege akceptata kune de laborantino en mia propra oficejo franclingve parolanta kaj de samideano el la redakcio de *El Popola Ĉinio*. Tiu lasta, tute amike, promenadigis min poste dum du tagoj.

Certe, ĉi tie, ĉiuj homoj tre kore kaj ege komplezeme akceptis min, sed eble pli ol la aliaj la esperantistoj.

Baldaŭ poste, la 1-an de oktobro estis la nacia festo de Ĉinio, speciale solena en tiu 15-a datreveno.

Mi ne longe parolos al vi pri la imponegaj kaj belegaj manifestacioj, ĉar jam nia revuo detalis ĉiujn cirkonstancojn de ili, mi nur diros kelkajn vortojn pri la rimarkinda spektaklo de la sabato, la 3-a de oktobro vespere: “La Ruĝa Oriento.”

“Muzika kaj danca epopeo” laŭ la titolo mem — epopeo de la liberigo kaj poste de la konstruo de Ĉinio dum pli ol kvardek jaroj — ĝi estis ludata de tri mil artistoj, el kiuj du mil gejunuloj, starantaj sur la du flankoj de la scenejo, kantis kantojn kiuj kortuŝis min ĝisfunde.

La sekvantan tagon, dimanĉon matene, mi legis ĉiujn tekstojn tiam kantitajn aŭ simple deklamitajn, en kiuj estis tri poemoj de Maŭ Zedong. Ili trafis vin kaj la prozo mem estis poezio.

Jen pri la senkomparaj festoj. Kion diri pri la popolo mem, ties vivo kaj la rapida, senpaŭza evoluado de la lando?

Ĉi tie, la plej multaj el la homoj ŝajnas rimarkinde junaj.

Kial do? Laŭ mia opinio, ĉar ili ne vivas lacigantan, ege agitan vivon kiel la nian, sed ian simplan, laŭnaturan vivon tute dediĉitan al la komuna bono, al la kiel eble plej rapida konstruo de ilia giganta lando, kaj tiu ŝultro-ĉe-ŝultra utiliga laboro intime ligas unu kun la alia, donante al ĉiuj el ili tiujn simpatiajn, fratecajn sentojn, kiuj precize konservas puraj siajn korojn kaj vizaĝojn, tiujn sentojn sen kiuj ne estas vera homeco.

Kompreneble ne estas eble ĉion rakonti pri miaj unuaj impresoj en Ĉinio, mi do nur parolos tiun ĉi fojon pri la Popola Komunumo de la Ĉina-Vjetnama Amikeco, kiun mi longe traveturis per aŭtobuso nord-oriente de Pekino.

Kun siaj tridek kvin vilaĝoj, siaj tridek mil loĝantoj, kies naŭ mil plene kaj kvar mil nur parte laboras, siaj kulturmaŝinoj, siaj pumpstacioj por irigacii ĉiujn kampojn laŭbezone, ĝi multe okulfrapis min.

Unue la homoj. Por kvin mil infanoj, la Komunumo provizas tridek kvin elementajn lernejojn kaj du mezgradajn, kaj por la izolaj maljunuloj (proksimume 100), kvin “feliĉajn domojn”.

Antaŭe ne estis elektro; nun ĝi lumigas ĉiujn; duono el ili posedas radio-aŭskultilon, estas tie telefono, kaj por distri kaj samtempe instrui junulojn kaj maljunulojn kino-veturilo senĉese travojaĝas la vilaĝojn.

Nun la laboro:

Starigita en 1958 per kuniĝo de ses kooperativoj, la komunumo ampleksas dek mil hektarojn.

Agrikulturo, jes, sed tamen, el 149 produktaj brigadoj, 49 laboras en akcesoraj industrioj: forĝejoj, farunejoj,

tegol-brikofarejoj, k.t.p. La fabriko de vermiĉeloj (amelo de la dolĉaj patatoj) liveras, ekzemple, po 800 kg. ĉiutage.

90% de la kampoj estas kulturataj per maŝinoj.

Pri la veteraj kondiĉoj, oni klarigis tion al ni:

La pluvo falas po 300 ĝis 1500 milimetroj ĉiujare, kaj en 1939, en kiu ĝi estis tamen malpli abunda ol en 1963, en unu sola vilaĝo, estis 28 dronmortintaj kaj 200 domoj detruitaj.

Iu loka proverbo diris: “La rivero fluas al la oriento kaj el dek jaroj naŭ estas mizeregaj”; nun, dank’ al la akvokonservujo de 13 milionoj da m³ kaj al la drenkanaletoj, tiu danĝero tute malaperis. Kontraŭe, oni venigas la akvon de tri km. malproksime kaj oni plialtigas ĝin 16 metrojn; estas naŭ pumpejoj, kaj irigaciaj kanaloj, 200 km. longaj, fekundigas la kampojn, el kiuj 90% estas plugataj per maŝinoj.

La produkto de cerealoj en 1963 estis, je 60% pli granda ol en 1957, kaj, post sufiĉa interdivido de ili inter la anoj de la Komunumo, tiu vendis al la ŝtato 5,160,000 ĝinojn da greno — tio estas 2,580 tunojn, ĉar la ĝino pezas duonon de kilogramo.

Plie, la Komunumo bredas multajn bestojn: blanknigraj bovinoj, kiuj donas bonegan lakton; dank’ al tre inĝenia elpenso de la bredistoj, ili estas elektre maŝinmelkataj dum malrapida turniĝo de granda ronda plato (unu minuton), sur kiu ili staras alvenantaj de unu vojo dekstre, forirantaj de apuda alia maldekstre. Estas vastaj brutejoj, kie ili precipe sekan fojnon manĝas, malfermiĝantaj sur ĉirkaŭbaritajn kampojn, en kiuj la 4000 bestoj promenas, ripozas, remaĉas.

Aliloke estas porkinoj — plej ofte nigraj — kun siaj multaj amuzaj idoj kaj, apude, virporkoj. En dek monatoj, la grasigotaj porkoj kreskas ĝis 90 kg. En 1963 la Komunumo vendis 2000 el ili al la ŝtato, kaj 5000 en 1964. Mirinda progreso!

Fine, kiom da blankaj anasoj! Kelkaj el ili — sendube la reproduktantoj — libere kaj feliĉe promenadas apud aŭ naĝas sur laĝeto; sed la ovoj en koviloj elkoviĝas; post naskiĝo, la anasoj dum kvardek kvin tagoj nature nutras sin; poste, oni perforte supersatigas ilin dek kvin aŭ dudek tagojn. Tiam oni mortigas kaj manĝas ilin.

Tre interesaj klarigoj de la direktoro de la Komunumo, antaŭ kaj post la vizito, en ĉambrego, kie dufoje ni manĝis la sukajn kaj belajn pirojn kaj trinkis teon kun la bonega lakto de la bovinoj.

Kompreneble, temante pri tia grandega kaj tiel rapide evoluanta lando, mi povis nur ekzameni kaj eĉ tre rapide, malmultajn el ĝiaj plej tipaj kaj allogantaj aspektoj.

Mi nun revenas al la ĉinaj homoj, kiuj plej interesas min, kaj mi opinias ne povi pli bone konkludi mian artikolon ol pere de traduko en esperanton de franclingva soneto, kiun ili inspiris al mi:

Ĉinio kaj Ni*

*Ĉinio enpena kaj severmora,
Ĉinio, kiu laboras kaj ridetas,
Ĝiaj noblaj gefiloj por sia patrino
Tage kaj nokte penadas,
Por sia vastega kaj fera patrino,
Kiu defendas kaj nutras ilin,
Kiu dum milito sian koron hardis
Kaj dum paco siajn fruktojn donas.
Ĉinio estu por ni modelo!
Ankaŭ ni, simple, kiel ĝi,
Refariĝu junaj kaj fieraj,
Ni sciu imiti ties penemon,
Sciu tranĉi en niaj komfortoj:
Orepoko niajn katenojn frakasos.*

*Ni”, ĉi tie, estas precipe la loĝantoj de la tiel nomataj “okcidentaj landoj”.



La aŭtorino (la dua de dekstre en la unua vico) kantas vjetnamlingve la kanton “Liberiĝo al suda Vjetnamio” kune kun alilandaj geamikoj en Pekino dum celebrado de la Maja Festo.



VEJĈIO

III. PRAKTIKA VEJĈI-LUDO (Daŭrigo)

5. Eguligaj Ludoj

Estas konate, ke ŝakludo devas esti aranĝata inter egale kapablaj ludantoj. Alie la ludo estas malpli interesa. Por ke la ludo ne difektu la intereson inter ludantoj kun eĉ ne-simetriaj kapabloj, la vejĉi-ludo trovis rimedon iel egaligi la fortojn de la du flankoj. Tio estas nomata en vejĉi-ludo "egaliga ludo".


Estas du manieroj de tia ludo:

a) Por iom malpli lertaj ludantoj sufiĉas, ke li uzu la nigrajn ŝtonojn. Ĉar tiam li ĝuas en la ludo privilegion ŝtonmeti la unua.

b) Por ludantoj multe malpli kapablaj oni aranĝas por ili antaŭajn ŝtonmetojn. La nombro de la antaŭmetitaj ŝtonoj estas decidita laŭ la kapabla diferenco inter la du ludantoj. La punktojn de la antaŭmetitaj ŝtonoj oni fiksas jene:

Por du antaŭaj ŝtonmetoj la punktoj estu A, Ĉ aŭ B, C; por tri antaŭaj ŝtonmetoj, la punktoj estu A, D, Ĉ aŭ A, B, C, aŭ similaj; por kvar — A, B, C, Ĉ; por kvin — A, B, C, Ĉ, D; por ses — A, E, C, B, G, Ĉ; por sep — A, E, C, B, G, Ĉ, D; por ok — A, E, C, F, Ĝ, B, G, Ĉ; kaj por naŭ — ĉiuj punktoj signitaj en Diag. 52. Tio signifas, ke la nigra flanko jam dislokigis siajn bazojn sur la tuta vejĉi-tabulo antaŭ komenco de la ludo kaj per tio akiris grandan pretan forton kontraŭ la blanka flanko.

Ĝis nun la tuta aboco de la vejĉi-ludo estas konigita



* * *

al niaj legantoj. Interesiĝantoj eble jam povas sin amuzi per ĝi laŭ la donitaj reguloj. Por esti lerta vejĉi-isto, oni devas sin perfektigi per ofta praktikado kaj aparta studo de koncerna literaturo.

(Fino)

* KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ *



TEATRA AKTIVADO DE ŜANHAJAJ LABORISTOJ

Antaŭ nelonge, 41 mallongaj dramoj kaj kantrakontoj estis prezentitaj dum la teatra festivalo de ŝanhajaj laboristoj por interŝanĝo


de spertoj. Ĉiuj tiuj prezentitaj programeroj estis verkitaj de ŝanhajaj laboristoj, kaj ili spegulis diversmaniere la bolantan batalvivon de la ŝanhajaj laboristoj sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio en la tri grandaj revoluciaj movadoj de klasbatalo, produktado kaj scienca eksperimentado.

NOVAJ BELARTAJ FILMOJ

La Ŝanhaja Farejo de Belartaj Filmoj produktis lastatempe la jenajn

filmojn: "Ni Amas la Kamparon" (movbilda filmo), "Taglibro de Eta Lin" (papertranĉa filmo), "Du fratetoj" kaj "Fari Portreton" (pupaj filmoj). Tiuj 4 filmoj kun modernaj temoj jam estas luditaj ĉirkaŭ la Internacia Infana Tago (t. e. la Unua de Junio).

La filmoj "Ni Amas la Kamparon" kaj "Taglibro de Eta Lin" spegulas la fizionomion de la infanoj en la nova socialisma kamparo de Ĉinio. "Du Fratetoj" prezentas paron da



Mamenchisaurus Hochuanensis, la *dinosaŭra fosilio*.

REKUNIGO DE MAMUTA DINOSAŬRA FOSILIO

LA dinosaŭra fosilio 22 metrojn longa kaj 3.5 metrojn alta, kiun oni elfosis en Siĉuan-provinco antaŭ kelkaj jaroj, estas la plej granda kaj plej kompleta fosilio de dinosaŭro ĝis nun trovita en Ĉinio, laŭ la opinio de ĉinaj paleontologoj ĝin ekzamenintaj.

Oni asertas, ke la giganta besto vivis antaŭ ĉ. 140,000,000 jaroj en la komenco de malfrua ĵurasa periodo de mezozoiko. Ĝia fosilio kuŝis 100 metrojn sub la tersurfaco ĉe la talio de Guloŭ-monto apud Tajheĝen en Heĉuan-gubernio, Siĉuan-provinco. Ĝin trovis anoj de la provinca ole-esplora grupo dum ĝenerala geologia esplorado en tiu regiono en 1957. Ĝin elfosis

samjare la Siĉuan-provinca Muzeo kaj konservadis la Ĉengdu-a Geologia Instituto ĝis la printempo de 1964, kiam oni ĝin transportis al la Instituto de Vertebra Paleontologio kaj Paleoantropologio en Pekino por rekunigado kaj determinado. Post atentema laborado dum pli ol unu jaro, la esplora kaj teknika personaro finfine riparigis la fosilion kaj rekunigis ĝiajn pecojn tiel ke ĝi reprenis sian originan aspekton.

La paleontologo Jang Ĝongjian kaj la juna esploranto Ĝaŭ Higin faris longdaŭran kaj zorgeman studadon pri tiu ĉi fosilio. Ĝiaj karakterizaj trajtoj: eksterordinare longa (ĉ. 10 metrojn) kolo, mallongaj korpo kaj vosto, neordinara nervo-

spino de la dorsaj vertebroj k. a. ilin gvidis al la konkludo, ke ĝi estas nova speco de dinosaŭro neniam antaŭe trovita en la mondo.

Tial sciencistoj decidis starigi en la klasifiko de paleontologio la novan specion de Heĉuan kaj la novan familion de dinosaŭro de Mamenĉi kaj donis al ĝi la nomon *Mamenchisaurus Hochuanensis* sp. nov.

La malkovro de la *Mamenchisaurus Hochuanensis* ne nur riĉigis la sciencan de paleontologio, sed ankaŭ donis pli kompletan fosilian atestaĵon por certigi la geologian tempon de la komenca stratumo de la malfrua ĵurasa periodo kaj studi stratums-cienca interrilaton de kontinentaj aspektoj de nia lando en la estonteco.

* KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ *

fratoj kun ruĝaj koltukoj, kiuj faris multe da bonajoj en ferioj por helpi aliajn. La ĉefroluloj en la pupofilmoj havas moveblajn okulojn kaj buŝon kaj tre interesas per siaj mienesprimoj. "Fari Portreton" temas pri kolektiva produktado en la kamparo.

53-KILOGRAMA GRAS-TUMORO FORTRANĈITA

Malofta 53.75-kilograma gras-tumoro de malriĉ-kamparano estas

sukcese fortranĉita de la Unua Dependa Hospitalo de la Vuhan-a Medicina Kolegio.

La paciento nomiĝis Ĉen Bennian. Li estas membro de la Giangkiaŭ-a Popolkomunumo de Ŝangĉeng-gubernio, Henan-provinco. En 1959, li malsaniĝis je ventra gras-tumoro kaj en la jaro 1964 lia ventro tiel ŝveliĝis, ke ĝia cirkonferenco atingis 162 centimetrojn. En la vintro de tiu jaro, li venis al la dirita hospitalo por kuracado.

La ĥirurgoj de la hospitalo studis pri la kazo kune kun invititaj kuracistoj, flegistoj kaj anesteziistoj de koncernaj organizoj kaj faris detalan planon de operaciado. Oni operaciis lin dufoje en la 12-a de nov., 1964 kaj la 22-a de feb., 1965 kaj fortranĉis la tutan tumoron, kiu pezis 53.75 kg. Post la operacio kaj ripozado en la hospitalo, Ĉen Bennian jam tute resaniĝis kaj hejmeniris en junio de la kuranta jaro.

POST LA KURSO

Vortoj kun "•" estas klarig-itaj en "Nia Vortareto"

Nofhan: Letero al Malproksimaj Amikoj (IX)

Nova Tero ĉe la Marbordo

Karaj amikoj:

Kredeble vi scias, ke Ĉinio havas longan mar-bordon. Laŭ la observado de geografoj*, ĉe kelkaj lokoj de la mar-bordo aperas ĉiu-jare nova tero el la maro.

Sude kaj oriente Ĉinio bordas al maroj, kaj la ĉeftera mar-borda* linio longas pli ol 14,000 kilometrojn. La ĉina tero estas dekliva* kun la okcidenta parto pli alta ol la orienta kaj la plejparto de ĝiaj riveroj fluas orienten en la Pacifikon.

Tiuj riveroj portas ĉiujare grandan kvanton da sablo kaj ŝlimo* de la okcidenta alt-ebenaĵo en la marojn. Oni konstatis post mezurado, ke ĉiujare la Flava Rivero portas proksimume unu miliardon kaj kvarcent kvindek milionojn da tunoj* da ŝlimo en la maron, rezulte de kio 3-5-kilometrojn larĝa nova tero elmergiĝas el la maro ĉe la enfluejo. Ekde 1947 ĝis 1952, la delto* ĉe la enfluejo de la Flava Rivero etendiĝis 25 kilometrojn en la maro.

Kvankam Jangzi-rivero ne estas tiom malklara kiom la Flava Rivero, tamen ankaŭ ĝia aluvia* ebenaĵo etendiĝas rapide en la maron. Ĉongming-insulo en la riverbuŝo de Jangzi-rivero havas areon de 550 kvadrataj kilometroj kaj formiĝis dum la lasta jar-milo. En la pasin-

teco, Ŝanhajo estis tuj apud la maro, sed nun ĝi jam estas 35 kilometrojn for de ĝi.

Ankaŭ aliaj riveroj de Ĉinio, nome Huajhe, la Perlo-rivero, Liaŭhe ktp. faras tian laboron de "monto-trans-lok-igo kaj mar-plen-igo". Post certa periodo, la amas-igita tero fariĝas fekunda*, kaj dank' al facila irigaciado*, ĝi povas uziĝi kiel bona kreskejo de gren-plantoj kaj* doni aparte abundajn* rikoltojn. Tial la Liaŭhe-ebenaĵo, Nord-ĉinia Ebenaĵo, Jangzi-rivera Delto, Perlo-rivera Delto k. a. estas grenejoj de Ĉinio.


Rakontoj pri Afanti

ŜARGO* POR DU AZENOJ*

Foje, la sultano* kaj la ĉef-korteg-ano* iris ĉasi kun Afanti. Ĉar estis varmege, ili demetis siajn vestojn kaj ilin donis al Afanti, ke li ilin portu sur-dorse. Daŭrigante la iradon, Afanti ŝvitegis sub la ŝarĝo. Tion vidinte, la sultano ekridis kaj diris:

"Ho, mia Afanti, via ŝarĝo pezas sufiĉe por unu azeno!"

"Ne, Via Moŝto*," respondis Afanti," ĝi estas tro peza eĉ por du azenoj!"



KONDUKU MIN AL DIO

Iutage, Afanti kovris siajn okulojn per blanka tuko kaj iris al la juĝisto, ŝajnigante sin blindiĝinta. La juĝisto sciis, ke Afanti ne kredas

je Dio kaj ekdonis lecionon al li profitante la okazon:

"Jen vi havas pro la nekredo je Dio! Jen Li for-prenis vian vidpovon! Tamen Dio estas bonkora. Tuj sur-genu-iĝu kaj konfesu* vian pekon* al Li kaj petu Lian helpon, ĉar nur Li povas vin kuraci."

"Ha-ha! bonege!" dirante Afanti deprenis la tukon, kaj fikse rigardante al la juĝisto li daŭrigis: "Bonvole konduku min al Dio!"

La juĝisto konsterniĝis kaj balbutis*: "Kkki—ki—ki—o..."

Nia Vortareto

abund-a — estanta en pli ol sufiĉa kvanto.

aluvi-o — tero alportita de fluo.

azen-o — long-orela ŝarĝ-besto; malsaĝulo.

balbut-i — paroli kun halt-et-oj kaj ripetoj de silaboj.

bord-o — apud-akva tero.

dekliv-a — kliniĝanta rilate al la horizonto.

delt-o — tri-angula insulo formita de disbranĉiĝo de rivero ĉe ĝia enfluo en la maron.

el-merg-iĝ-i — el-iĝ-i.

fekund-a — multe frukto-dona.

geograf-o — geografi-isto, sciencisto studanta la aspekton de diversaj regionoj de la tero.

irigaci-o — akvumado.

konfes-i — mem malkaŝi sian eraron, pekon k. s.

kort-eg-an-o — ŝtat-ofic-isto de reĝ-lando.

moŝt-o — respekta titolo.

plant-o — kreskaĵo.


sultan-o — turka regn-estro.

ŝarĝ-o — pezaĵo portata.

ŝlim-o — akvo-moligita tero kuŝanta sur fundo de lago kaj rivero.

tun-o — 1000 kilogramoj.

CERTE TRIUMFOS LA POPOLO DE VJETNAMIO! CERTE MALVENKOS LA USONAJ AGRESANTOJ! — Bildlibro eldonita de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino. Formato: 22.5 x 25.5 cm. 52 p. Havebla ĉe Libro-servo de la Ĉina Esperanto-Ligo, P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio.



**CERTE TRIUMFOS
LA POPOLO DE VJETNAMIO!
CERTE MALVENKOS
LA USONAJ AGRESANTOJ!**

Neordinara estas ĉi tiu bildlibro. Traleginte ĝin mi pensas ke pli konforme estus ĝin titoli *Faktoj en Vjetnamio*. Mi estas ĉino, najbaro de Vjetnamio, tamen, neniam antaŭe konis tiel sisteme kaj figure la faktojn, kiuj okazis lastatempe en Vjetnamio.

Sur ĝia unua paĝo estas mapo de Vjetnamio, helpe de kiu la legantoj povas ekkompreni ke la liberiga batalo de la vjetnama popolo jam flamas tra la tuta lando kaj gajnis unu venkon post alia.

Escepte de du pentraĵoj, la tuta libro estas el fotoj registrantaj faktojn. Komence de la unua parto vidiĝas la usona generalo Maxwell Taylor, iam komandinta la usonan agresan armeon en Koreio, kiu rekognoskas ĉe la provizora limlinio en Vjetnamio. Kion li celas? La

sekvantaj bildoj donas al ni respondojn.

Amasoj da pacamaj loĝantoj en suda Vjetnamio estas arestataj. La kamparanoj estas prirabataj je siaj greno kaj havaĵoj. Vilaĝo estas englutita de militfajro, kaj kamparano povas nur forlasi sian loĝejon kaj fuĝi kun du orfoj. Uson-pupaj soldatoj rikanas antaŭ amaso da kadavroj. Estas homo kies ventron la usona agresanto distranĉas kaj hepaton elprenas. Granda nombro da viroj kaj virinoj veneniĝis de la toksaj kemiaĵoj disŝprucigitaj de usonaj aeroplanoj. La bela lando de Vjetnamio fariĝis surtera infero.

Sed la heroa popolo de suda Vjetnamio leviĝis finfine. Kaj ili gajnis sinsekvajn venkojn en la batalo kontraŭ la agresarmeo tre moderne armita. Leginte la duan parton de tiu ĉi libro, oni povas havi klaran komprenon pri tiu "miraklo". La Popola Liberiga Armeo de suda Vjetnamio jam estas armeo strikte organizita, kun potenca batalforto kaj severa disciplino. Ĝi fabrikis kaj utiligis kompare postĝintajn armilojn, kaj samtempe batalakiris ankaŭ sennombrajn novajn armilojn alportitajn de la usonaj agresantoj, kaj liberigis per ili la popolon de "strategiaj vilaĝetoj", detruis bombe loĝdomojn, bazlokojn, aerodromojn de la usonaj agresantoj, eĉ la "ambasadorejon" de Usono turnante ĉiujn ilin en ruinojn.


El la tria, kvara kaj kvina partoj de tiu ĉi libro oni aŭdas la voĉojn de la tutmonda popolo pri la problemo de Vjetnamio. La Demokratia Respubliko de Vjetnamio nun fariĝis la celaĵo de la usona imperiismo por pli intensa agresado. Sed nur unu voĉo de la tiea popolo aŭdiĝas: "Defendu la Nordon, Helpu la Sudon!" Kaj unu sama voĉo aŭdiĝas el Ĉinio, Koreio, Albanio kaj multe da aliaj landoj en Azio, Afriko, Latinameriko kaj Eŭropo: "Oponon al la agresado de la usona imperiismo kontraŭ Vjetnamio! Jankioj, for el Vjetnamio!"

Por la legantoj kiuj deziras informiĝi pri la vera stato de Vjetnamio, tiu ĉi libro estas valora registro. Malmultaj estas la klarigoj facile kompreneblaj por Esperanto-komen-

cantoj, eĉ neesperantistoj povas kompreni la enhavon de la bildlibro.

H. F.

ISLANDAJ PRAVOĈOJ — Kolekto de tri rakontoj kaj unu poemo el antikva Islando, tradukita de Baldur Ragnarsson. Eldonis la Eldona Societo Esperanto, Malmo, Svedlando, 1964.



Jen libreto el antikva islanda saga-literaturo. Kiel anoncita de la eldoninto ĝi redonas en la internacia lingvo kelkajn el la gemoj de tiu literaturo. Por fremduloj, kiuj nur fragmente scias pri la sagaoj, estas malfacile doni al ĝi ĝustan takson ĉu la elektitaj pecoj povas reprezenti la plej bonajn. Tamen el ili oni almenaŭ povas ĝui la spiriton kaj stilojn de la islandaj sagaoj.

La poemo "Völuspá" (la Antaŭdiro de la Aŭguristino) kun fabela enhavo, kia en praliteraturo de ĉiuj nacioj, estas la plej interesa. Ĝi priskribas la kreigon kaj la finon de la mondo. Ĝi spegulas la simplajn sciojn kaj imagojn de la prahomoj pri la naturo.

La rakontoj estas aŭ pri konfliktoj inter la primitivaj regintoj, aŭ heroaĵo de bravuloj aŭ vojaĝaj aventuroj. Por interesigantoj de antikva literaturo, ankaŭ ili estas legindaj.

La tradukoj estas simplaj kaj klaraj. La enkonduko de la tradukinto donas tre utilajn sciojn pri la islandaj sagaoj.

Fine mi volas diri, ke se ĝin sekvos tradukoj el moderna progresema islanda literaturo multe pli faciligus kompreno pri la islanda popolo.

(V. R.)

EN LA HIAMEN-A UNIVERSITATO

Laŭ informo el la Hiamen-a Universitato en Fugian-provinco, la Esp-a Kurso de tiu universitato finis sian lernadon en lasta junio. Je la 21-a de tiu monato, k-do Kiu Ĝi, estrarano de la Ĉina Esperanto-Ligo, vizitis la gestudentojn de la kurso kaj ĉi tiuj aranĝis kunsidon por

E-STUDENTOJ EN LA PEKINA UNIVERSITATO

34 gestudentoj de la Pekina Universitato finis la lernadon de E. dum unu kaj duona jaroj. Ili lernis Esperanton kiel la duan fremdan lingvon. Por raporti sian rikolton, ili prezentis multajn esperantajn programecojn en "Amuza Kunveno" je la 21-a de majo. Ĉie en kaj ekster la kunvenejo vidiĝis afiŝoj kun esp-aj kaj ĉinaj skriboj. La prezentado inkluzivis teatraĵojn, deklamojn, kantojn, paroladojn ktp. Ĉio ĉi estis tradukitaj aŭ adoptitaj en Esperanton fare de la gestudentoj mem kaj donis al la spektatoroj bonan impreson de junula vigleco kaj fervoro. Ekzemple, per teatraĵoj oni reliefe bildigis la heroecon de la vjetnama popolo ("Etulino An" el *Leteroj el Sud-vjetnamio*), rakontis al infanoj la amaran pasintecon kompare kun la nuna feliĉo por vekti amon ĉe homoj al la nova socio kaj decidemon daŭrigi la aferon de revolucio ("Unu Laborista Familio") kaj laŭdis la energian persistecon en laboro kontraŭ malfaciloj ("Malsaĝa Avo"). Ĉiuj programecoj estis interesaj kaj instruaj. La sukceso akirita en tiel mallongtempa lernado de Esperanto mirigis multajn profesorojn de la universitato.



Sceno de "Unu Laborista Familio".

lin bonvenigi. Ĉeestis krom la gestudentoj ankaŭ k-do Ĝang Julin, vicedestro de la universitato kaj veterana esperantisto.

ROZPLANTIDO -- AMIKECA SIMBOLO INTER LA ĈINA KAJ FRANCA POPOLOJ

Antaŭ nelonge ni ricevis de la Ĝardeno de Internacia Amikeco en Villecresnes de Francio rozplantidon, per kiu la ĝardeno volas reciproki la ĉinajn florsemojn, kiujn ni sendis al ĝi laŭ peto de s-ano Jack A. Rousseau en 1963. Post ricevo de la rozplantido ni tuj ĝin zorge transplantis en florpoton. Dank' al konvena akvumado kaj flegado, nun sur ĝiaj branĉoj aperis jam novaj verdoj. Kun agrabla koloro kaj vitala freŝeco ĝi prospere kreskas kaj estas rigardata en nia redakcio kiel simbolo de amikeco inter la ĉina kaj franca popoloj.

INTERNACIA ESPERANTO- FERIO EN POLLANDO

De la 2-a ĝis la 15-a de oktobro, 1965, okazos en pitoreska montara ripozloko MIEDZYGORZE Sudeto-montaro, Pollando, Internacia Esperanto-Ferio. La Ferio aranĝas Ferio-Fako de Centra Konsilantaro de Polaj Sindikatoj kaj Okcidenta Regiono de Pola Esperanto-Asocio. Dum la Ferio, estos multaj interesaj programecoj inkluzive de ekskursoj, esp-a kurso kaj renkonto de l' amikeco kun ĉeĥoslovakaj esperantistoj en apuda urbo Klodzko. Interesiĝantoj petu detalajn informojn pri la aranĝoj ĉe: Pola Esperanto-Asocio, Okcidenta Regiono, Turisma Fako, Wrocław, str. Dubois 3, Pollando.

DUOBLA JUBILEO DE 81-JARAĜA ESPERANTISTO EN BULGARIO



Ĉi-jare estas la duobla jubileo de k-do Ĥristo Todorov Stamboliev, kiu estas 81-jaraĝa kaj senlace aktivadis kaj laboradis por Esperanto dum 54 jaroj. Dum sia longa laborado li edukis multajn esperantistajn aktivulojn por la movado kaj faris fruktodonajn propagandojn por la internacia lingvo. La esperanta societo "Libero" kaj la "Oktoobra Esperanto-Societo" en Ruse (Bulgario) planis solenan celebren en junio por festi lian jubileon. Oni deziras al la pioniro bonan sanon kaj longdaŭran feliĉon.

(Laŭ Dimitr Ivanov)



povas eltrovi la gvidanton post trifoja diveno, li devas eliri denove kaj rekomenci divenadon post kiam oni ŝanĝas la gvidanton.

KORESPONDI DEZIRAS

Kolektiva Ludo

KIU GVIDAS?

Ĉiuj partoprenantoj, escepte de unu el ili, kiu devas atendi ekster la ĉambro kiel divenanto, sidigu en rondo kaj elektu sian gvidanton, kies gestojn ĉiuj devas imiti. Nun la gvidanto komencu gesti (ekzemple manklakadi) kaj ŝanĝi sian geston de tempo al tempo, kaj la ceteraj lin imitu sen rimarkigo pri la gvidanto. Oni envoku la divenanton, ke li diru, post observo, kiu gvidas. Se li sukcesas, la gvidanto devas eliri kiel divenanto, kaj se li ne

SOLVO DE "KIEL DEMANDI?" EN NIA LASTA NUMERO

La demandanto devas diri: "Se mi demandus al via fratino: 'Kiun vojon mi devas preni por iri al B?' kiel ŝi respondus al mi?"

Se la demandito estas la knabino kiu ĉiam diras la veron, ŝi diros laŭ la mensogo de sia fratino: "Ŝi diros al vi, ke vi iru laŭ tiu ĉi vojo (t. e. la vojo al D). Se la demandito estas la mensogemulino, ŝi diros same, ĉar ŝi ĉiam mensogas. La demandanto do prenu la alian vojon ol tiun indikitan en la respondo, kaj li ne eraros.

*Chiritescu Vasile, str. Cotita No. 2, Cluj, Rumanio. Dez. interŝ. pm. neuzitajn en kompletaj serioj kun ĉl.

*Lie Tju Sian, Tromol pog 21, Jogjakarta, Indonezio. 16-jaraĝa lernanto, nova esperantisto, dez. kor. kun geamikoj el ĉl. pri ĉ. t.

*Lie A-Pak, str. Dagen N-ro. 56, Jogjakarta, Indonezio. 16-jaraĝa lernanto, nova esperantisto, dez. kor. kun geamikoj el ĉl. pri ĉ. t.

*Shaban Hasani, Petkaj-Shemeri, Kukes, Albanio. Dez. kor. kun Ĉinio k. a. socialismaj landoj pri lingvo, literaturo, sporto kaj pk.

*La Esperanto-Societo "Verda Torĉo" en urbo Gabrovo, Bulgario aranĝos dum septembro-oktobro ĉi-jare ekspozicion de bildokartoj reprezentantaj nacikostumojn tutmonde. Ĉiu sendinto estos rekompencita. Sendu al: Ganĉo M. Radakinov, bulv. "Aprilov" Gabrovo, Bulgario.

*Jeljazko Djankov, ĉefkontisto, 41-jaraĝa. Serĉas seriozajn gekorespondantojn el tutmondo, interŝ. bk., leterojn, fotojn kaj diversajn temojn. Adreso: Ruse, str. "Voden" 5, Bulgario.

PLIA ESPERANTO-STRATO EN ITALIO

Je la 11-a de aprilo ĉi-jare okazis en Casalecchio di Reno (Bologna, Italio) inaŭguro de strato titolita "Esperanto". La ceremonion ĉestis membroj de la Bologna Esperanto-Grupo, reprezentanto de la Itala Esperanto-Federacio, direktoro de la Itala Esperanto-Instituto kaj la urbestro. Aldone ankaŭ neesperantistaj loĝantoj de tiu strato aplaudis la manifestacion.


Post la ceremonio pli ol 100 ĉeestintoj aranĝis renkonton kun tagmanĝo kaj gaja ludo kaj promenado en fama restoracio "Calzavecchio" kaj ĝia parko.

LA 4-A KULTURA SEMAJNO EN FRANCO

La 4-a kultura semajno organizita de la Franca Unuiĝo por Esperanto ĉi-jare okazis en Bauge (Francio). Ĝin partoprenis esperantistoj el naŭ landoj de tri kontinentoj.

En la semajno estis aranĝitaj diversaj interesaj paroladoj, kursoj por komencantoj kaj projekciado de diapozitivoj de belvidajoj de Norvegio.

La paroladoj prenis diversajn temojn. La apudmetita foto montras la scenon de la parolado de s-ro Martin (dekstre) pri la angla lingvo. La staranto estas s-ro René Liech-Walter, prezidanto de FEU. Ankaŭ la gejunulaj partoprenintoj multe profitis en la praktiko de esperantaj paroloj.



Korajn Dankojn al Niaj Legantoj

MMULTAJ legantoj laŭdas ke nia gazeto progresas kun ĉiu jaro. Jes. Sed ni devas diri ankaŭ ke ĉiuj progresoj de nia gazeto ligiĝas kun la kuraĝigo, subteno kaj instigo de niaj legantoj. Estas vi, kiuj konstante rimarkigas la rolon ludatan de *El Popola Ĉinio* en la konigado de la nova Ĉinio al ĉiuj popoloj kaj per tio kuraĝigas nin al perfektigado de la gazeto. Estas vi, kiuj de tempo al tempo faras al ni proponojn kaj sugestojn pri la temoj kaj enhavo de nia informado, ebligante al ni peti de niaj kunlaborantoj pli trafajn artikolojn kaj elekti pli interesajn materialojn, kiujn la legantoj ŝatas kaj bezonas. Estas vi, kiuj diligente prezentas al ni bonajn opiniojn kaj utilajn kritikojn, por ke ni sciu kiel perfektigi la gazeton kaj kontraŭ kiuj difektoj ni luktu. Kaj fine estas vi, kiuj ĉiujare varbas por ni novajn abonantojn, donante bazon por senĉesa disvolvado de nia laboro.

Kun nia gazeto (n-ro 5/1964) ni sendis al niaj legantoj enketliston lastajare. Ĝis nun pli ol 1000 legantoj jam defale plenigis kaj resendis al ni la liston, malgraŭ sia okupiteco. Multaj eĉ surskribis siajn ekstrajn opiniojn. Tio estas plia atesto de la bonvolemo de la legantoj al nia afero.

Kanada leganto J. H. skribis: "E.P.Ĉ. estas simila al lumo, kiun vidas blindulo por la unua fojo. Ĝia enhavo donas al ni novan komprenon pri via lando kaj popolo."

M. E., leganto en okcidenta Germanio diris: "Via gazeto estas rimarkinda kaj rekomendinda por interkompreniĝo de popolo al popolo kaj inda al la granda tradicio de via lando."

Bulgara leganto R. I. Ĉ. diris: "Via gazeto estas bona kaj interesa. Per ĝi mi konatiĝis abunde kun interesaj aferoj de via lando kun miljara kulturo kaj de via socialisma konstruado."

J. S., legantino en Rumanio, skribis: "Via lando situas malproksime, sed E.P.Ĉ. alproksimigas ĝin al ni."

Similajn pritaksojn esprimis ankaŭ multaj aliaj legantoj. Ili ĉiuj estas

granda kuraĝigo al ni. Ĉar ĝuste tio estas nia celo kaj nun pruviĝis ke tio estas ankaŭ la postulo de niaj legantoj. Do, ni daŭrigu nian kunlaboron en tiu direkto!

Krom fari laŭdojn, iuj legantoj samtempe montris al ni ankaŭ mankojn. Ekzemple, H. A. el Nederlando skribis interalie: "Ni ege admiras la laborojn, kiujn vi faris post la Liberiĝo... Tamen mi timas ke vi tro multe pri ili komunikas, kaj E. P. Ĉ. tiamaniere fariĝos tro unutona por eksterlandanoj."

Ankoraŭ iuj legantoj donis al ni multajn valorajn sugestojn pri elekto de bildoj, uzado de fakaj terminoj kaj enpaĝigo de tekstoj kaj ilustroj, ktp.

Ni vere ŝuldas multajn dankojn al ĉiuj tiuj legantoj.

El la ricevitaj leteroj de niaj legantoj ni trovas ke pri la malnova Ĉinio nemalmultaj tamen aŭdis iatempe iujn onidirojn ĝustajn kaj malĝustajn, sed pri la nova Ĉinio oni aŭ scias nenion aŭ informiĝis pere de distordajoj el kontraŭ-ĉiniaj verkoj de Pearl S. Buck k. s. Tial ni volas doni kiel eble multe da informoj por ke niaj eksterlandaj amikoj povu rapide ekkoni la fundamentan situacion de la nova Ĉinio. Tio estas necesa kaj farenda. La impreso de unutoneco venas de tio ke ni laboris ne sufiĉe bone, sed ne de tio ke ni faris tro multe. Ni bone notos tiun bonvolan rimarkigon en nia koro kaj klopodos forigi tiun mankon. Ankaŭ aliaj bonvolaj proponoj ricevos nian plej grandan atenton en niaj laboroj.

Inter la resenditaj enketlistoj troviĝas admono de iu leganto: "Ne uzu nian paceman lingvon tiel malkaŝe kaj malamikece kiel batalilon faligi, ekz., la usonan imperiismon!" La skribinto aludis pri la artikolo "Ĉinaj Esperantistoj Subtenas Vjetnaman Popolon" en n-ro 5, 1964, de nia gazeto. Ni ne dubas pri la bonkoreco de la skribinto. Sed, ĉu li ne estas tro naŭva kaj tro forge-sema?

Antaŭ ĉio li pensas nur ke Esperanto estas pacema lingvo, sed for-

gegis kiel oni povas sukcese defendi la pacon. Kiel ĉeĥo li forgesis serion da sangaj instruoj post la anekso de Sudet-regiono fare de la germana faŝismo kaj tra kia vojo la popoloj, sklavigitaj de la faŝisma Germanio, poste reakiris sian liberecon kaj la nunan pacan vivon.

Ĉar oni ne povas esti neŭtrala "pri la problemo de paco", ni ne povas ne oponi firme kontraŭ la usona imperiismo kiu lanĉis militon en Vjetnamio kaj multaj aliaj lokoj en la mondo, malgraŭ ke tion oponas ankaŭ la usona popolo. Ĝin ni oponis kiel diverslandaj popoloj oponis siatempe kontraŭ la germana faŝismo.

Cetere la skribinto forgesis ankaŭ la plej gravan parton de la Deklaracio pri la Esperantismo, nome el la tria punkto, kiu havas apartan signifon por disvastigo kaj disvolvo de Esperanto:


Materiala mastro de tiu ĉi lingvo estas la tuta mondo, kaj ĉiu deziranto povas eldonadi en aŭ pri tiu ĉi lingvo ĉiajn verkojn kiajn li deziras kaj uzadi la lingvon por ĉiaj eblaj celoj...

Kion li oponas, estas ĝuste tiu Deklaracio. Pri tio multaj esperantistoj ne povas konsenti. Cetere, opono kontraŭ imperiismo kaj koloniismo kaj lukto por mondpaco estas la plej grava historia tasko de la tutmonda popolo en la nuna tempo. Se Esperanto kiel komunikilo de la homa socio izoliĝus de tiu grava afero, kiu tiom strikte ligiĝas kun la liberiĝo de la tuta homaro, kaj servus sole kiel kabineta distraĵo de malmultaj revuloj, kion bonan tio alportus al la disvastigo de Esperanto? Ĉiu esperantisto ja povas tion respondi.

Tial ni ne povas samopinii kun tiu samideano. Tamen ankaŭ lin ni dankas pro tio ke li donis al ni okazon klarigi nian opinion pri tiu problemo al niaj legantoj.

Parolante pri Esperanto, ni ofte nomas ĝin "nia lingvo", nun multaj legantoj ankaŭ nomas E.P.Ĉ. "nia gazeto". Jes, ĝi estas "nia gazeto redaktata en nia lingvo". Do ni redaktantoj kaj legantoj kune klopodu por fari ĝin ĉiam pli riĉa, pli bela kaj pli utila al interkompreniĝo kaj amikeco inter la ĉina popolo kaj la popoloj de ĉiuj landoj.

La Red.



Kamparo en Guangdong-provinco.

Foto de Muo Pinli

